

2^a JARO.

OCEANO.

N^{ro} 12^a

TRA LA MONDO.

·TUTMONDA·ILUSTRATA·REVUO·ESPERANTISTA·

JUNIO

1907.

ĜENERALA PLANO KAJ ENHAVO.

ĈIULANDA VIVADO: Internacia enketo pri edukado. — La instituto S^{ta} Katarino, en Peterburgo, de *Generalo Levitskij* (RUSUJO). — La Ackworth'a lernejo, de S^{ro} R. L. Cleave (ANGLUJO). — Kampara edukada hejmo en Haubinda, de S^{ro} J. W. Eggleton (GERMANUJO).

NUNTEMPAĴOJ: Monata kroniko, de Eŭg. kaj Aŭg. Montrosier (FRANCUJO).

ARTISTA KAJ LITERATURA VIVADO: Notoj pri la vivado de Shakespeare, de *Florence A. Meigh* (ANGLUJO). — La Glavo, de *Lawrence Sterne* kaj *J. C. Snape* (ANGLUJO).

TRA LA MONDO: Spa, de A. G. (BELGUJO).

INFANA PAĜO: La Hundo de Brisquet, de *Ch. Nodier* kaj *J. Pion* (FRANCUJO).

SPORTOJ: Sporta kroniko, de *L. de Guesnet* (FRANCUJO) kaj *J. Mattes* (SVISUJO).

VIRINA PAĜO: La Modo, de *Roksano*.

DIVERSAĴOJ: Io bona povas veni de Anglujo, de *H. G. Marechal* (ANGLUJO).

ESPERANTISTA ALDONO: La 2^a germana kongreso, de *Sergius Winkelmann* (GERMANUJO). — Ĉirkaŭ la Tria Kongreso. — Esperanto internacia praktikilo. — Kroniko. — Bibliografio.

FELIETONO: La specialistoj, de *J. H. Salomon* (HOLANDUJO).

MILITISTARO KAJ MARISTARO: Ruĝa-Kruco. En la franca ŝiparo.



UNU NUMERO: 75 CENTIMOJ.

CAROLINE
1907. OXFENFORD, EV.



Premio al niaj legantoj.


Por esti agrablaj por niaj legantoj kaj samideanoj, ni klopodadis kaj faris interkonsenton ebligantan liverigi, *hejmen* kaj sen transportkosto en ĉiun Eŭropan landon krom Rusujo (Transmare kaj Rusuje, eksteren transporto kaj limdepago plue), je la malgranda prezo montrata ĉi sube, la precizegan poŝhorloĝon L'ESPERO, kiu eliras el unu el la plej bonaj svisaj fabrikoj, kaj kies ujo, el blanka metalo oksidita kvazaŭ malnova arĝento, estas fotografe montrata ĉi apude (ĝustagrande).

En la du kvalitatoj, la poŝhorloĝo estas plene garantiata, bonege reguligita, radaro je anko perfektigita, eleganta formo. La sendo estas farata kontraŭ poŝta repago aŭ antaŭa pago, laŭ peto sendita al la administracio de « Tra la Mondo ».

Unua kvalitato: 30 fr. Dua kvalitato: 20 fr. Por Rusujo, aldoni 5 fr. por la transporto kaj limdepago. Por U. Ŝ. de A., aldoni 10 fr. por la limdepago. Antaŭa pago estas *necega*.

ASP KANDELLANTERNOJ

por Biciklistoj



Malgranda, Malpeza,
Oportuna, Pura,
Neestingebla
en Ventego,

Funkciadas bonege
nur kiam oni uzas
la por ĝi

Konstruitajn ASP-Kandelojn
120.000 Lanternoj jam venditaj!
Kostas: 4 danajn kronojn,
kun lenso 5 kronojn,
18 Kandeloj kostas 1 1/2 kronojn.

SENDOTA ĈIEN DE


O. F. ASP, Kopenhague.
DANUJO.

ANGLUJO

Propraj Kondiĉoj.

Generala Agento:

Sro G. RUTTER, 30, Red
Lion Squar, LONDON.



Fervojoj de Paris-Lyon-Méditerranée.

EKSKURSOJ al Fontainebleau kaj Moret.

Ekskursaj vagonaroj, malaltpreze, okazos
la 7, 14, 21 kaj 28^a de Julio, de Parizo al
Fontainebleau kaj Moret.

Prezo de l' lokoj, iro kaj reiro:

Fontainebleau	2 ^a klaso . . .	4,50 fr.
	3 ^a » . . .	3, »
Moret	2 ^a klaso . . .	5,50
	3 ^a » . . .	3,50

Deiro de Parizo je 7 h 26 matene.

Alveno al	Fontainebleau . . .	8 h 40 mat.
	Moret	8 h 55 »

Reiro per ĉiuj samtagaj vagonaroj, laŭ la
kondiĉoj antaŭvidaj por la ordinaraj vetur-
antoj.

Nombro de lokoj limigita.
Senpageco por 30 kilog. da pakajoj.

Anoncetoj.

39. Nia Sporta Redaktoro, S^{ro} L. de Guesnet,
26, Avenue des Ternes, Paris XVII^e, Francujo,
estus tre danka al la samideanoj kiuj bonvolus
sendigi al li fremdajn katalogojn de aŭtomobiloj
kaj motorcikloj. Li dankos per ilustritaj
poŝtkartoj.

40. S^{ro} A. PLOUSSU, 4, Place du Lycée, Grenoble,
(France), deziras interŝanĝi kun fremdaj ge-
samideanoj stereoskopiajn pozitivajn sur vitro,
en formato 6 X 13. Tuj respondos al petletoj.

Por la blinduloj. — Kvina nomaro.

Sro Cogen	15 fr.
Sro Brunet	1 fr.
Sro Bord (vendo de M'sieu Esperanto)	2 fr.
Jam ricevitaj	109 fr.
Sume	127 fr.

Nia fervora samideano Tellini nin sendis
verkon ĵus aperintan: « Kristanaj preĝoj por
blinduloj » (50 cent.). La eldonistino, Fino Adria
Tellini (Udine, *Ialujo*, San Rocco) intencas
eldoni aliajn volumojn presitajn kiel tiu ĉi
per Braille'a sistemo. Ni konsilas la akiron,
por donaci, al la amikoj de l' blinduloj. Ni
rememorigas ankaŭ pri « Esperanta Ligilo »,
organo por blinduloj. (Vidu la anoncon).

ESPERANTISTOJ

PASIGU LA SOMERON
EN

Aix=les=Bains

(FRANCLANDO)

Sendu 30 centimojn al la
LIBRAIRIE DE L'ESPERANTO
kaj vi ricevos aŭranke la interesan broŝuron
de D^{ro} J. DARDEL, pri la termala kuracado
en tiu urbo.

Ĉirkaŭ la Kongreso.

Tutmonda Labora Societo.

Ĉiuj amikoj havantaj interesajn proponojn
por prezenti, rilate al la « laborista movo »,
estas petataj ilin sendi kiel eble plej baldaŭ al
la Sekretario, S^{ro} P. BLAISE, 4, rue du Bourg-
Tibourg, Paris, IV^e.

Ĉiuj bonaj ideoj estos disputataj dum la
Cambridge'a kunsido. — Inter aliaĵoj estos pri-
parolataj:

- 1^o la rimedoj uzotaj por disvastigadi Esperanton inter la gedungitoj;
 - 2^o la fondo de sekcioj en ĉiuj landoj;
 - 3^o la elekto de internacia konsilantaro.
- Por klarigoj pri la Societo, sendo de regularo, ke, oni sin turnu al la supredonita adreso.

Por la Konsilantaro: E. STOECKEL, Prez.

Al samideanoj en la tuta mondo.

GRAVA AVIZO.

- NI povas havigi al niaj klientoj kaj korespondantoj ĉiujn librojn esperantajn kaj ĉiujn librojn NE esperantajn.
- NI akceptas abonojn por ĉiuj gazetoj en la mondo.
- NI aĉetas malnovajn librojn kaj gazetojn en Esperanto.
- NI sendas niajn katalogojn senpage.

Librairie de l' Esperanto
(Internacia esperantista librefoj)
15, Rue Montmante
Paris.

Nova adreso



Ĉampanino "Mirinda"

1 fr. 75 kaj 3 fr. 50 ĉiu botelo
por 12 boteloj, minimume, enpakitaj en keston.

Ĉe S^{ro} Ch. JADEAU, MERCUREY (S. & L.) France

PRI ESPERANTO

LA DUA GERMANA ESPERANTISTA KONGRESO EN DRESDENO.

La dua germana esperantista Kongreso, okazis en Dresdeno de la 8a ĝis la 12a de Majo, havis bonegan sukceson dank' al la lerta organizacio de S^{ro} D^{ro} Schramm, la prezidanto de la Dresdena Societo « Esperanto ». Tiu ĉi kongreso, en kiu ĉeestis ne nur membroj de G. E. S. sed ankaŭ kelke da gesamideanoj de Rusujo, Francujo, Anglujo kaj Aŭstrujo montris tre bone la esperanteman movadon en Germanujo.

Jam kelke da tagoj antaŭ la kongreso, samideanoj de l' Dresdena grupo laboris tre vigle. En nur tri tagoj oni aranĝis grandan Esperantan ekspozicion kaj verkis kongresan gazeton, kiu enhavas la tutan programon de la kongreso kaj mallongan gvidlibron tra la ekspozicio, en germana kaj Esperanta lingvoj.

Por la ekspozicio la Dresdena Grupo ricevis de ĉiuj mondpartoj ekspoziciaĵojn, kiujn la posedantoj tre malavare donacis al nia grupo.

Tre bone reprezentitaj estis nome Francujo kaj Anglujo.

Oni elmontris 52 ĵurnalojn kaj multe da vortaroj de la diversaj lingvoj. Interesa estis la kolekto da klasikaj kaj originalaj verkoj en Esperanto. La Fundamenta krestomatia, la Biblio de nia lingvo, kuŝis sur aparta tablo ornamita per floroj kaj silka Esperanta flago. Super tiu ĉi Zamenhofa altaro pendis granda portreto de nia majstro. Librojn de Blinduloj ni ankaŭ havis. Oni trovis, per la konata Braille'a sistemo, lernolibron, gazeton, jarlibron, katalogon, k. t. p. Ankaŭ la komerco uzas tre fervore Esperanton. Kiel novaĵon mi nur volas citi tabakpipojn kun la portreto de Zamenhof, kaj katalogojn Esperantajn pri sciencaj instrumentoj, belajn Esperantajn bierglasojn kaj stelsignojn, k. a.

Diverssistemaj skribmaŝinoj estis ekspoziciataj. Bonege estis la granda aparta ekspozicio de Hamburga grupo kaj la privata ekspozicio de S^{ro} Kŭchler (Frankfurt a/M.)

Nun la kongreso mem.

Jam mardon la 7an de Majo kelkaj membroj de la G. E. S. alvenis. La unua inter ili estis la prezidanto de G. E. S. S^{ro} Dr. Mybs (Altona).

Merkredon la 8an de Majo, je la deka matene, oni malfermis la ekspozicion. Je la oka vespere estis la antaŭa kunveno de la alvenintaj anoj de G. E. S. en la hotelo « Stadt Rom » sub la prezido de D^{ro} Mybs.

Ĵaŭdon, la 9an de Majo (Ĉielirtago) matene, je la 11a, estis la oficiala malfermo de la kongreso en la Unuĝa domo (Vereinshaus). Ĉeestis pli ol 1100 personoj inter kiuj mi rimarkis multe da profesoroj kaj scienculoj; plie membroj de la Dresdena registaro, oficiroj, kaj tre grandan nombron da sinjorinoj.

Kelkaj minutoj post la 11a, S^{ro} D^{ro} Mybs malfermis la kunsidon. S^{ro} urba konsilisto Adam salutis, je la nomo de la urbo Dresden, la G. E. S. kaj diris ke la dua germana esperantista kongreso ne volas krei novaĵon sed nur aldoni la lastan ŝtonon al la granda konstruaĵo. S^{ro} D^{ro} Schramm dankis en la nomo de la Dresdena Grupo pro la honoro, ke Dresden havas la germanan kongreson en siaj muroj.

Nun paroladis S^{ro} sekreta kortegkonsilisto Prof. D^o Ostwald Leipzig (Geheimer Hofrat, Prof. D^r) pri la demando de internacia lingvo (1).

Poste, Prof. D^r Schmid el Potsdam parolis pri la demando: Ĉu Esperanto taŭgas kiel internacia lingvo?

Esperanto estas tre taŭga kiel ilo por internacia korespondado. La plej bonan pruvon donas la ekspozicio. La lingvo havas

malgraŭ ĉio simplecon, riĉecon de formoj, kaj tuj ebligas la adeptojn *trakuki pensojn, ideojn, kaj ne nur vortojn*. Plie la parolanto klarigis la sistemon de Esperanto.

Post kiam Sinjoro D^{ro} Liesch, Leipzig, estis farinta mallongan paroladon, D^{ro} Schramm legis telegramojn alvenintajn de ĉiuj mondaj partoj, ankaŭ de nia majstro. Sinjoro D^{ro} Mybs fermis la kunsidon kaj je la dua posttagmeze estis granda tagmanĝo en hotelo « Stadt Rom ».

Je la tria, la gekongresanoj faris ekskurson al Meissen.

Vendrede kaj sabate estis la laboraj kunsidoj.

Vendredon je la 8a vespere estis amuza kunveno en Palmengarden (ĝardeno de l' palmoj). La programo estis tre bone aranĝita.

Sinjoro Engst ludis majstre koncertan fantazion per altviolono. Fraŭlino Wakezinska tre bone deklamis la preĝon de Zamenhof. La bela fraŭlino Oschatz diris Esperantan saluton al la gekongresanoj. Sinjorino Praetorius kaj prof. Scheffler kantis kelkajn esperantajn kantojn, kaj la naŭjara Aleĉjo Engst deklamis la konatan fablon de Lafontaine « la korvo kaj la vulpo ». Bonege estis ludataj du scenoj el Minna de Barnhelm, komedio de Lessing, de Finoj Busch, Zschockelt kaj S^{ro} referendaro Arnhold.

Je la fino de la kunveno sinjoro Kŭster el Görlitz kantis memverkitan poemon « Ni laboru kaj esperu ».

Dimanĉon granda ekskurso tra la Saksa Svisujo okazis.

SERGIIUS WINKELMANN.
Dresden.

Kiel oni vidas, niaj germanaj samideanoj laboras ageme por efektivebligi la deziron de multe da ili, nome ke la 4a Esperanta kongreso havu lokon en Germanujo.

Ĉirkaŭ la Tria Kongreso.

LETERO DE LA TRIO POR LA TRIA.

Kiel kutime ni ricevis leteron de la Trio, kiu afable komencas, dankante nin denove pro la respondoj, kiujn ni faris al ĝiaj alvokoj por helpo. Ĝoje ni faris ĉion eblan, kaj ĉiam agos same en tiaj cirkonstancoj, estante feliĉaj helpi la progresojn de nia kara afero. El la letero ni elĉerpas la novajn sciigojn kapablajn interesaj niajn legantojn.

« Ni esperas ke kiel eble plej multe da Kongresanoj kunvenos Sabaton la 10an de Aŭgusto, kaj la Londonaj samideanoj esperas, ke granda aro da internaciaj esperantistoj kolektiĝos en tiu vasta urbego sabaton aŭ dimanĉon, 17 aŭ 18an ».

Ni do aranĝis kun la loĝejmastrinoj por plena semajno.

La posttagmezo kaj vespero de Sabato, 10an, estos okupataj de diversaj neoficialaj kunvenetoj, vizitoj en la urbo, kaj similaj.

Dimanĉon matene okazos Rom-Katolika Diservo, ĉe kiu la predikanto estos Monsinjoro Giambene, el Romo, la eminenta Arĥivisto de la Sankta Kolegio de Indulgoj, helpata de Abato Richardson el Bruselo kaj, espereble, ankaŭ de nia bonekonata amiko Abato Peltier el Tours. La Diservo okazos ĉirkaŭ la 10a horo.

En la paroĥa kaj universitata preĝejo Great St. Mary's okazos ĉirkaŭ la 11a horo esperantigita Diservo, kie la predikanto estos Pastro J. C. Rust helpata de diversaj fervoraj pastraj amikoj. Speciale nekonformista Diservo okazos vespere.

La posttagmezon okazos multaj promenadoj kaj vizitoj ĉirkaŭ Kembrig; kaj vespere, en la Grenvendejo, preskaŭ naŭ cent



DUM LA GERMANA KONGRESO.

D^{ro} Schramm. D^{ro} Mybs.

(1) Analizo de la parolado troviĝas en nia antaŭa no.

esperantistoj kunvenos por la unua el la serio de vespermanĝoj. Tiu ĉi, kaj ankaŭ tagmanĝoj, estos ĉiutagaj, kaj La Trio kore esperas, ke ĉiuj tre ŝatos la eblon, kiun ili donos, por facile renkonti tre multajn internaciajn amikojn.

Tiuj kiuj ne deziras (aŭ ne povis pro manka de spaco) tien eniri por manĝi, kunvenos aŭ en hotelojn, aŭ en diversajn manĝosalonojn. Vegetaranoj havos specialan manĝosalonon, kie oni ne uzos kuponon sed pagos laŭmanĝe.

La Trio eldonas kuponarojn de Lito kun fruamatenmanĝo, tagmanĝo kaj vespermanĝo, ĉar ni opiniis ke tia sistemo multe helpas ne-Anglojn. Tiuj, kiuj aĉetis tiujn kuponarojn ricevos ilin en Julio, kiam ankaŭ la Kongresa Libro kaj Bileto estos preparitaj.

La Kongresa Libro estas interesa verkaro, enhavanta Anglan-Esperantan Frazlibron, multajn sciigojn rilate veturadon en Anglujo, kaj vivadon. Tie ankaŭ troviĝos Gvidlibro kaj Historio de Kembrig, kun plano de la urbo, artikoloj pri biciklaj kaj boataj ekskursoj, la ludo Kriketo, la mona sistemo kaj la tezuriloj Anglaj, k. t. p. Kelkaj paĝoj estos blankaj, por ke oni povu fari notojn sur ilin laŭ bezono.

Kompreneble la libro ankaŭ enhavas la kiel eble plej definitivan programon, sed la fakto ke la libro estos eldonata kelkajn semajnojn antaŭ la Kongreso mem certigas, ke tiu programo ne povos esti tute plena.

Por tiuj ĉi postaj anoncoj ni uzos ĉiutagan ĵurnalon « La Tria » kiu estos vendata sur la strato po unu penco, laŭ oportuna libra formato. Ĉiuj anoncoj pri diversaj kunvenoj kaj raportoj pri la kunvenoj jam efektivitaj estos tie presataj.

Ni esperas ankaŭ ke ĉiu numero de tiu ĉi konservinda verketo enhavos almenaŭ unu gravan artikolon verkitan de Eminentulo Esperantista.

La Oficiala parto de la Kongreso komencos je Lundo 12^a, per diversaj Akceptoj de la Kongresanoj de la Urbestro kaj de la Universitato.

La Oficiala Malfermo de la Kongreso okazos vespere en la Granda Teatro, kiam Doktoro Zamenhof faros sian gravan ĉiujaran Paroladon.

Ĉiutage de Mardo ĝis Vendredo okazos en la Urbodomo la oficialaj agadaj kunsidoj de la Kongreso. Kompreneble tiuj, kiuj ne deziras ĉeesti aŭ unu aŭ alian el tiuj ĉi povos propravoje pasigi kontentigan matenon eksterdome. La oficiala Fermo de la Kongreso okazos matene je la 17^a de Aŭgusto.

Posttagmeze, de Mardo ĝis Vendredo la Kongresanoj sin okupos diversmaniere. Tiam okazos ĉiuj kunvenoj de la specialistaj societoj, kaj La Trio kore esperas ke ĉiuj grupoj profitos la okazon kiel eble plej multe, kaj ke iliaj internaciaj konsilioj antaŭenpuŝos la progreson de la homaro.

Kompreneble tiuj kunvenoj estas devige neoficialaj rilate al la nura pro Esperanta Kongresego, sed, estante peresperantaj kongresetoj, ili tre efikos por altiri la atenton de la diversspecaj specialistoj al nia Afero.

Se ne tiel okupataj, niaj vizitantoj faros ekskursojn sur tero aŭ rivero.

Mardon ni kondukos grandan aron en la Ĝardenan Urbon, ĵaŭdon ni ĉiuj estas invitataj ĉeesti la Polic-Sportojn kaj la Kongreso mem donacos ĉiaman « pokalon » nomatan « La Esperanta Pokalo » kaj en la postkongresaj jaroj tiu servos kiel memorigilo — se tio estas bezonata — pri tre memorinda kaj memorata kunveno. Vizito al la Katedralo de Ely, bicikle aŭ fervejo, okazos vendrede, kaj ankaŭ simila vizito al la interesa urbo St. Ives. Pri bicikloj, la vojoj apud Kembrig estas en tre bonega stato, kaj kvankam en la norda regiono ili estas preskaŭ tro ebenaj por kontentigi la energiajn rajdantojn, la suda kaj orienta pejzaĝo estas tre interesa. Ni do konsilas, ke ĉiuj, kiuj scias la biciklarton, ĝuu iom da ekzercado dum la Kongreso. Estos eble plej konvene liri biciklojn, anstataŭ ol porti ilin de malproksime, pro tio ke niaj anglaj fervojoj ne estas tiel antaŭemaj kiel iliaj francaj najbaroj, kaj la portado de bicikloj estas tre multekosta afero ĉe ni. Kelkaj Ĝardenaj Kunvenoj ankaŭ okazos posttagmeze.

Tiuj, kiuj ŝatas naĝbanojn, estos kontentaj ekscii ke, pro malgranda pago, la Estraro de la Leys Lernejo afable permesos al Kongresanoj, post monro de la Bileto, sin bani en ilian ĉarman Banon. Pli malproksime, kompreneble, oni povos sin bani en la rivereton Cam.

Vespere okazos la teatraj ludoj, Koncertoj kaj Eksterdoma festo en kiun ni estas tre afable invitatitaj de la Amikaj Societoj de Kembrig. Kredeble Mardo kaj Merkredo estos elektataj por Teatra Kunveno, kaj la ĵusnomita festo akazos ĵaŭdon 15^{an} de Aŭgusto. Je la sekvanta punkto ni organizas grandan Nacivestan Balon kaj, por ke oni ne malsukcesu trovi konsilanton pri la elektinda vesto, ni nomis kelkajn fervorajn amikojn naciaj Direktoroj kaj Helpantoj.

Ni esperas, ke ĉiu Kongresano sendos poŝtkarton (se respondado estas postulata bonvolu sendi respondpagitan karton) al sia nacia Direktor por sciigi, kia vesto estos portata, aŭ por demandi konsilon.

Jen la du Direktoroj, al kiuj la plejmulto devos skribi: *Franco*, Sro de Menil, 79 Boulevard St. Germain, Paris. *Anglujo*, Dro W. C. Clark, Arborfield, Weybridge, Surrey, Anglujo.

Bone organizita, tiu Balo altiros tre certe multe da publika atento. Ĉiujn regulojn ni presigos en la Kongresa Libro, kaj ni forte rekomendas ĝian traigon.

La kosto de la Kongresa Bileto estas la duono de la ora unuo de ĉiuj landoj — eble estontaj Kongresoj uzos la bonegan Spesmilan sistemon proponitan de Kumbatalanto de Saussure.

Tiu ĉi karto estos sendata al la aĉetintoj ĉirkaŭ tri semajnoj antaŭ la Kongreso, kune kun Atesto, kiu rajtigos je Fervoja Rabato. Ĝis Aŭgusto 4^a, la Bileto estas transdonebla, se pri la nomo de la anstataŭulo oni sciigas La Trion.

La kosto de la Kuponaro por sepokta dormado kaj frua matenmanĝo, kvin vespermanĝoj kaj kvin tagmanĝoj en la Grenvendejo estas 45 fr. (18 sm.) kaj la manĝobiletaj estas transdoneblaj sed ne la loĝebiletaj krom en la okazo, ke la loĝejmastrino jam antaŭe konsentis je tia semajnmeeza ŝanĝo.

La kosto de dormoĉambro kun uzo de salono kaj frua matenmanĝo por unu semajno estas ĉirkaŭ 25 fr. (10 Sm.) kaj post peto La Trio rizervos ĉambrojn laŭe. Ni rekomendas al Vegetaranoj aliĝi en tiun ĉi kategorion.

Oni devas sendi kun ĉiu mendo almenaŭ unu kvinonon de la luprezo, kaj la ceteraj kvar-kvinonoj estas pageblaj antaŭ Aŭgusto 4^a.

Al la demando "Kiu venos?" ni preskaŭ povas respondi "Ĉiu, kiu ĉi estas".

LA TRIO POR LA TRIA
2, Kings Parade, Cambridge.

Por la fotografistoj.

Ni povas aldoni ke almenaŭ unu oficiala *Kliŝrivelejo* estos rezervata dum la Kongreso.

Por traduki la Biblion.

Unu tagon en la daŭro de la Tria Kongreso, okazos en Cambridge kunveno de personoj interesitaj pri la Traduko de la Sankta Biblio en Esperanton, celante: —

(A). Sciigi pri la provoj jam faritaj, ĉu de komitatoj, ĉu de privatuloj;

(B). Konsideri kiamaniere oni povas akiri tradukon vere internacian;

(C). Konsiligi pri la rimedoj por la publikigo de tia traduko. Sciigoj pri ĝisnunaj tradukoj de ia ajn parto de la Sankta Biblio devas esti sendataj al Pastro C. G. WILKINSON, Waresley, Sandy, Anglujo, kiu pretigos raporton por la kunveno.

JOHN CYPRIAN RUST, *Pastro*.
Soham, Anglujo.

En Britujo.

2^a Skota esperantista Kongreso.

Komence de Junio okazis en Linlithgow la dua Kongreso de Skotaj esperantistoj: ĉirkaŭ 80 el diversaj urboj kunvenis sukcese. Oni kantis, deklamis multe, kaj gaje parolis kaj paroladis. Inter la oratoroj estis Sro John C. Scott, Glasgow, kiu, inter aliaj, legis gravan leteron ĵus ricevitatan de la esperantista konsulo en Glasgow — nia amiko Buchanan — kaj skribitan de la guberniestro de Nov-Zelando, Sro J. E. Ward, en kiu tiu lasta esprimas sian simpatian al Esperanto, kiun li subtenas oficiale ĉiaokaze; Sro R. J. M'Laren; Sro J. M. Warden kaj W. M. Page, Edinburgh; Sro Aleks. Pryde, Dundee, Fine Sro G. D. Buchanan faris alvokon por kolekto, ebligante la efektiviĝon de blindulara kongreso en Cambridge. Kiel oni vidas niaj skotaj amikoj firmigas ĉiujare sian organizacion « *The Skotsman* » 3^a de Junio favore raportis pri la kongreso.

Francaj esperantistoj en Folkston'.

The « *Folkestone, Hythe, Sandgate and Cheriton Herald* » 25^{an} de Majo, raportas pri grava vizito de 200 francaj esperantistoj en Folkston', organizita de la grupo en Calais (Kales'grupo).

Post la elŝiĝo, multaj « Hura! » kaj « Vivu! » aŭdiĝis, kun « God save the king » (Dio savu la reĝon) kaj « La Marseillaise ». La vizitantoj estis akceptataj en « *Urba Domo* » de la mayor (urbestro) mem. Saluti la samideanojn Sro A. P. Southce, prez. de la grupo, kiu afable nin sendis interesan foto'n montrantan la multenombrian amason kun verdastelaj flagoj ĉe la elŝiĝo; Sro H. Clegg, la sindona sek. de B. E. A.; Sro Herriman, sek. de l' Kalesa grupo; Finez. Tiu lasta tradukis france la alparolon de l' Urbestro, tute favoratan al Esperanto, « kiu bonege efikos por la amikiĝo kaj profito de l' popoloj ».

La Folkston' a grupo eldonis angle tre belan urban gvidlibron. La sukceso de tiu amika kuniĝo ebligas ekvidi, kiel granda estos tiu de la Tria!

STELETO.



Al D-ro Marseille.

ĈE LA LERNEJO DE HAUBINDA: LA DESEGNADO.

Internacia enketo pri Edukado (*)

15 Landoj partoprenintaj.

La Instituto de Sankta Katarino, en Peterburgo (Rusujo). — La Ackworth'a Lernejo (Anglujo). — La « Landerziehungsheim » (Germanujo)

Instituto S^{ta} Katarino, en Peterburgo.

Flanke de la kurioza priskribo de monaĥineja edukado, kiun faris al ni S^{ino} Hulanicka, oni interese legos jenajn detalojn pri la vivado de la lernantinoj en Instituto de 1^o Ordeno de S^{ta} Katarino en S^{ta} Peterburgo, kiujn ni ĉerpas el letero de nia eminenta samideano, generalo Levitskij.

Tiu ĉi lernejo, trietaĝa granda domo, kuŝas en Nevskij prospekto kaj enhavas multe da ĉambroj, salonoj, vastan preĝejon kaj grandan ĝardenon. La kosto de jara edukado estas 450 rubloj (475 sm.). La estraro konsistas el ĉefestrino, du helpantinoj, kaj unu inspektoro por sciencaj fakoj.

En lernado, la atento sin turnas ĉefe al lingvoj, precipe franca. En malaltaj klasoj instruas profesorinoj; kaj, nur en plej altaj, profesoroj havantaj universitatan edukitecon. Ĉiu klaso havas du klasajn sinjorinojn (gubernistinojn), kiuj devas paroli kun edukatinoj: unu per franca lingvo, alia per germana.

Rimarkinde estas ke la knabinoj tie ĝuas la Tri Okojn, tiel akre postultajn de la ĉiulandaj laboristoj, t. e. 8 horoj por laboro, 8 horoj por ripozo kaj manĝoj, 8 horoj por dormo.

La lecionoj, kiel en preskaŭ ĉiuj edukejoj, daŭras 1 horon, kaj inter ili estas paŭzo 10-minuta.

La gubernistinoj manĝas kun la lernantinoj, parolas kun ili kaj zorgas ke ne estu laŭta rido aŭ

troa babilado. La matenmanĝo konsistas el teo kun blanka pano; la tagmanĝo, el tri manĝoj: supo, io el viando kun iu ajn salato, kaj kukaĵo laŭ sezono; la vespermanĝo el du manĝoj. Oni asignas 33 kopekojn (35 sd.) por la ĉiutaga nutraĵo de ĉiu lernantino.

Dum la liberaj momentoj, kiam la vetero estas bela kaj eĉ en vintro, la knabinoj promenas en la ĝardeno; klasaj sinjorinoj ilin observas, kaj zorgas por ke ili konduitu ĝentile, sen iaj ajn ludoj: ili devas etikete kaj nobele iradi laŭlonge de la vojetoj ĝardenaj, babilante inter si.

De la 5^a ĝis la 7^a posttagmeze, ili pretigas sciencajn temojn kaj ekzerciĝas je fortepiano en apartaj malgrandaj ĉambroj, kaj ili faras gimnastikon en specialaj kostumoj. Ĉiuj edukatinoj, post esploro de kuracisto, estas dividitaj en rektulinoj kaj kurbulinoj, laŭ la stato de la vertebraro, kaj la lastaj faras specialan gimnastikon: rampadon sur ŝtuparoj, diversajn movojn per bastonoj kaj kugloj, dekminutan kuŝadon senmove sur planko, havante sub si litkovrilojn. En malaltaj klasoj ili gimnastikas ĉiutage, sed iom post iom la lecionoj plimaloftiĝas ĝis unu ĉiusemajne. En dua kaj en unua (plej alta) klasoj, gimnastiko ne estas.

Kiel oni vidas per tio, en tiu ĉi instituto oni sin okupas pli atente pri fizika edukado kaj konduto de la lernantinoj ol pri scienco. Tamen, en la lasta monato, tiu ĉi programo aliĝas kaj ĝi proksimiĝas la pro-

(*) Sekvo. Vidu la Nojn 8an, 9an, 10an, 11an de la gazeto.

gramon de la virinaj gimnazioj, en kiuj, male, al fizika edukado ne turnas sian atenton ilia estraro, sed en kiuj scienca lernado estas starigita multe pli bone ol en institutoj.

La fraŭlinoj dormas en komunaj ĉambroj po 25 en ĉiu; unu aŭ du guvernistinoj ĉiam deĵoras dum nokto en tiuj dormoĉambroj.

Gepatroj, parencoj, zorgantoj, povas viziti la lernantinojn dimanĉe de 12 h. ĝis 2 h. kaj jaŭde de 1 h. ĝis 2 h. Ne estas promenadoj eksteren. La guvernistinoj ne partoprenas la ludojn de la edukatinoj.

La Ackworth'a Lernejo (Anglujo).

La leganto certe miros pri la zorgo kun kiu en la rusa instituto ĉi supre priskribita, la knabinoj estas kutimigitaj al etiketo, nobeleco kaj korekteco de la sintenado. Tre certe tio estas tre konforma je la karaktero serioza kaj je la ĉiam iomete solena eleganteco de la rusaj virinoj.



EN LA HAUBINDA LERNEJO: LA FOJNKOLEKTADO.

K. Z. D-ro Marseille.

Jen, nun, lernejo en kiu la edukado estas absolute laŭ la angla sistemo, kiu ĉefe celas pligrandigi la energion, la volon kaj la iniciatemon de la junuloj. Ĝi estas *Ackworth Lernejo* en la *West Riding* de *Yorkshire* (Jorkŝajr) je tri mejloj, proksimume, de la urbo *Pontefract*, pri kiu S^{ro} R. L. Cleave skribis al ni jenajn sciigojn, laŭ artikolo de la ĵurnalo « *Comrades* all ».

« Tiu lernejo estas por ambaŭ seksoj: ĝi enhavas proksimume 120 knabinojn kaj 180 knabojn.

La ĉefaj konstruaĵoj de la lernejo formas tri flankojn de kvadrato, en la interno de kiu estas asfalta ludejo por knaboj kaj herbeja ludejo por knabinoj. Tiuj du ludejoj estas apartigitaj per strio el asfalto, kaj nur uzataj de geknaboj kiuj estas parencoj.

La kvara flanko de la kvadrato estas la granda

ĝardeno en kiu oni kreskigas fruktojn kaj legomojn por la uzo de la lernejoj, kaj kie, je kelkaj dimanĉoj, oni permesas ke la knaboj promenu. En la malsupra parto de la ĝardeno estas laŭbo kaj ŝtonaĵo, gajigita dum la bela sezono per floroj.

Ĉe la fino de la ludejo estas teraso, malantaŭ centra konstruaĵo; oriente kaj okcidente estas la partoj por knaboj kaj knabinoj.

Sur la teretaĝo estas la du manĝoĉambroj kaj la centra biblioteko. Ĝi estas meblita tre komforte, de la malnovaj lernantoj, kiel memoraĵo de la centjara datreveno de la fondo de la lernejo, en la 1879^a j.

La manĝoĉambro de la knaboj estas granda, alta kaj bone lumigita, kaj portretoj de estintaj lernejestroj kaj instruistoj de la lernejo. En la manĝoĉambro por knabinoj, kiu antaŭe estis la paroladejo, la ĉefaj ornamaĵoj estas du belegaj ĉizitaj superfajraĵoj. La knabinoj donis unu, aĉetitan per la mono, kiun ili gajnis kiel premion en atletaj sportoj. En ambaŭ ĉambroj oni povas vidi tabulojn, sur kiuj estas skribitaj la nomoj de tiuj, kiuj gajnis la plej bonajn stipendiojn.

La knabinoj kaj knaboj lernas aparte, en belege meblita laborejo.

La ludoj estas precipe la du ĉefaj anglaj ludoj *pikludo* kaj *kriketo*, kaj la lernejaraj *dekonuj* kontraŭludas kun najbaraj *dekonuj*. Por tiuj ludoj ili havas specialajn kampojn kaj en la kriketa kampo estas bela nove starigita *paviljono* (ĝardendometo). Krom tiuj ĉi ludoj, la knaboj ludas hokej'on en la ludejo, sed la knabinoj, kiuj estas pli lertaj, pro konstanta ekzercado, ludas sur la kampo, kaj kelkfoje kontraŭludas kun lernantoj de aliaj lernejoj. Dum la somero la knabinoj ludas kriketon kaj tenison.

Ni ankaŭ havas belan naĝbanejon, longan je 200 futoj kaj larĝan je 30 futoj, uzitan dum la somero de la knaboj kaj ankaŭ knabinoj,

gimnastikejon kaj manlaborejojn.

Mi ne devas forgesi nian Asocion por Natura Historio kaj ĝiajn kolektarojn, la ekskursojn, la aŭtunajn diversajn amuzojn, tekunvenojn k. t. p. Multaj lernantoj ankaŭ fotografadas, kaj neniu el ili, kiel oni vidas per tiu ĉi priskribo de la vivado en *Ackworth*, havas tempon por mallaboro.

Oni vidas la gravan rolon de la diversaj ludoj en la anglaj lernejoj. En Francujo, male, en la ŝtataj lernejoj, la lernantoj povas ludi nur 15 minutojn je la oka kaj la deka matene, 1 horon je tagmezo kaj je la kvara, kaj eĉ, bedaŭrinde, dum tiuj liberaj momentoj, ili tute ne ludas, sed nur promenas en korto, plej ofte inter kvar muroj. Nur jaŭde kaj dimanĉe, dum 3 horoj posttagmeze, ili promenas aŭ ludas ekstere.

Sed la urba laboro okupas preskaŭ la tutan tempon. La lernantoj ricevas ĝenerale, en la superaj klasoj, 5 horojn da lecionoj ĉiutage; mi eĉ konas junulojn dekseksjarajn, en iuj specialaj klasoj, kiuj ricevas pli ol ses horojn da lecionoj ĉiutage. Plie ili havas 6 horojn da persona laboro en lernoĉambroj, sekve almenaŭ 11 horojn da cerba laboro ĉiutage. En Germanujo, la programo estas tre simila.

Jam de kelke da jaroj oni demandis al si, ĉu tiu perforta encerbigo de scienco al infanoj, je la aĝo de kreskado kaj de intelekta formiĝado, ne havas bedaŭrindan influon sur ilian sanon korpan kaj moralan. Kelkaj pedagogiistoj, opiniinte ke tiu edukada metodo estas rekte malbona, fondis lernejojn en Germanujo kaj en Francujo, en kiuj la infanoj estas edukataj laŭ principoj tute novaj kaj ege atentindaj. Ni unue allasas la plumon al nia bona kunlaboranto S^{ro} Eggleton, por priskribo de unu el tiuj lernejoj, tiu de Haübinda en Germanujo. Ni donos poste sciigojn pri la fama franca « Ecole des Roches ».

La « Landerziehungsheim ».

En la germana duklando Sachsen-Meiningen, proksime de l' norda limo de Bavarujo, kuŝas sur la suda rando de l' bela Turinga Arbaro la granda kamparbieno Haübinda. Sur tiu ĉi bieno troviĝas la t. n. *Landerziehungsheim*. Miaj samideanaj gelegantoj, ne posedantaj la germanan lingvon tiel riĉan je vortoj multesilabaj, jam ekkrias: « Kia nomo strangege! Kio do estas via *Landerziehungsheim*? » Mi permesas al mi proponi la jenan tradukaĵon Esperantan: « Hejmo edukada kampara ». Jam nun ili ekkomprenas, ke la *Landerziehungsheim* estas iaspeca lernejo. Jes, ĝi estas granda privata lernejo, lernejo kiu jam de kelkaj jaroj estas famkonata ne sole en Germanujo sed ankaŭ en multe da aliaj landoj, sed, al tio, lernejo tute malsimila al ĉiuj aliaj ŝtateregataj lernejoj de Germanujo. Ĉiu scias, kiaspecaj institutoj estas tiuj ĉi lastaj. La plimulto da ili estas sendube, je unu vidpunkto, bonegaj instruoj, sed ili havas plejparte unu malbonaĵon: al la malfeliĉaj lernantoj oni tie plenegigas la kapon per ĉiuspecaj sciencoj kaj lernaĵoj, tute ne zorgante (almenaŭ en la urbaj lernejoj) pri ilia sano korpa. Tro ĝojriĉa certe ne estas la vivo de tiuj gimnazianoj! sed en Haübinda ni trovas ion tute malsaman. Tie ĉi oni zorgas egalgrade pri la spirito kaj pri la korpo de l' infanoj. Oni ne devigas ilin prilaboradi ĝis noktomezo malfacilajn lernekercojn, sed oni donas al ili multe da libereco, permesante al ili multe vivi ekstere kaj multe sin doni al ĉiuspecaj ludoj eksteraj. Unuvorte, la *Landerziehungsheim* estas por la infanoj

vera paradizo! Por vin konvinki, ke tiu ĉi eldiro tute ne estas trograndigo, mi vin petas viziti, kune kun mi, tiun ĉi lernejon rimarkindan....

Estas la dekdua horo en belega somertago. La fervojo alkondukis nin ĝis la Meiningen'a urbeto Hildburghausen. Tie ĉi ni dungas kaleŝon, kiu devas nin veturigi ĝis Haübinda. La duhora veturado tra kamparo ĉarmoriĉa estas treege agrabla. Alveninte, ni tuj ekvidas mirindaĵojn. Tie ĉi, en tiu ĉi granda legomĝardeno, gaje laboradas dekduo da knaboj per fosiloj, rastiloj, sarkiloj; ĝis la talio malvestitaj, nudkruraj, ili nenion portas krom mallonga genupantalono, malpezaj sandaloj, kaj pajla ĉapelo; kaj tiamaniere, samtempe laboradante, ili prenas sanigan sunbanon! Tie, sur granda herbejo, alia junularo egale senĝena, egale senvesta, sin okupas je l' fojnfarado. Aliloke, kelke da junaj sportamantoj faras novan tenisludejon, nivelante, mezurante. Enirinte en la grandan ĉarpentistojn, ni vidas areton da lignajistetoj, kiuj sin ekzercadas



Kl. D-ro Marseille.

EN LA HAUBINDA LERNEJO: LA SKIGLITADO.

je l' artoj de l' segado, de l' rabotado, de l' tornado. En la forĝejo ni trovas kelke da junuletoj la blovilon manuzantaj, aŭ eĉ svingantaj la martelegon..... Jen ekaŭdiĝas la kvarhora sonorilo: ĉiuj kunvenas en la manĝoĉambron por preni la *Vesperbrot* (kukojn aŭ bulkojn kun taso da kafo); sekvas duhoredaŭra studado, dum kiu la lernantoj faras siajn lernekercojn, sin preparante por la lecionoj de l' venonta tago; poste, la vespermanĝo. Je tiu ĉi manĝado, kiel ankaŭ je la ceteraj, ni ne povas ne rimarki, kiom simpla kaj saniga estas la ĉi tiea nutrado: sufiĉege da legomoj, fruktoj, ovoj, fiŝaĵo, lakto, k. t. p., sed tre malmulte da viando; nenia alkoholaĵo. Post la vespermanĝo, ankoraŭ unu horo libera, kiun la infanoj ordinare dediĉas al ludoj eksterdomaj, kiel ekzemple piedpilkludo, laŭteniso k.c.; kaj forte ekfrapas nin la lerteco kaj fortikeco de l' junaj

ludantoj. Sed kio nin mirigas pli ol ĉio, — kiel dum tiuj ludadoj, tiel ankaŭ en multaj aliaj aferoj de l' lerneja vivado, — tio estas la interrilato inter la edukatoj kaj la edukantoj. Kiel libere, ameme, eĉ kamarade ili kunvivadas, neniel simile je superuloj kaj subuloj, sed tute kiel amikoj, konfideciuloj, samcelanoj!..... Je la oka vespere ĉiuj « hejmanoj » kunigas en la « kapelo » n (germane, *Kapelle*). Kaj tie nin atendas ankoraŭ unu surprizo. Tiu ĉi kapelo, — la plej bela ĉambro de l' domo, — ne estas, ĝustedire, preĝejo. Tamen ĝia nomo iom eklezia sendube igis nin supozi, ke la hejmestro, D-ro M—; faros ian diservon solenan, kun preĝoj kaj kantoj religiaj. Nenio simila! Ni aŭdas anstataŭe, interesan legadon el klasika verkisto germana, mallongan rakontaĵon, kiu eble ektuŝas ian kordon en la knaba koro kaj elspiras la kuraĝon, la fidelecon, la verecon, la amon, — la kvar virtojn enskribitajn sur la blazonŝildon de Haŭbinda. Klarvideble estas, ke, en tiu ĉi hejmlernejo, tute ne ekzistas atmosfero dogmata aŭ sektanisma, sed jam de nia alveno ni certigis ke reĝas tie ĉi spirito altmorala..... Je la naŭa, la infanoj iras kuŝiĝi, antaŭe preninte malvarman duŝon. Kompreneble, ĉe tiuj ĉi Spartanetoj harditaj, restas la tutan nokton larĝe malfermitaj la fenestroj de l' dormoĉambroj.....

Se ni deziras sciigi kiamaniere la Haŭbindanoj pasigas la horojn antaŭtagmezajn, ni devos frumatene leviĝi la morgaŭan tagon. Jam je la sesa ĉiuj sin levas; poste fariĝas tra la kamparo dekminta kurado; je 3/4 de la 7^a, matenmanĝo, kaj je la 7^a kaj 1/4 komenciĝas la instruado. Ĉeestante tiujn lecionojn, ni denove konvinkiĝas pri tio, ke la *Landerziehungsheim* tre diferencigas de aliaj lernejoj. La instruado okazas nur matene kaj fariĝas laŭ plej novaj metodoj psikologiaj. Oni penadas inspiri al la lernantoj intereson kaj entuziasmon pri la laboro spirita. Oni evitas ĉian unuflankan pritraktadon de l' lernobjekto per la instruisto; la instruisto kaj la lernantoj kunlaboradas; tiu metas al tiuj ĉi senintermankajn demandojn, por ekzercadi iliajn kapablojn de observado, de konkludado, de komparado. Pri la lingvoj modernaj oni instruadas laŭ la t.n. « metodo senpera », zorgante pri tio, ke la lernantoj akiru antaŭ ĉio lertecon je la uzado *parola* de tiuj ĉi lingvoj..... Ni diru pasante, ke la lingvoj franca kaj

angla ne estas la solaj tie ĉi instruataj. Baldaŭ, — verŝajne post la libertempo Pentekosta, — oni malfermos, je la aprobo de la lernejestro, kurson Esperantan.....

Per la supredirito mi volis precipe priskribi la ĉiutagan vivadon de la lernantoj; por alplenigi tiun ĉi pentraĵon pri lernejo memorinda, restas al mi nur la klarigado de l' principoj edukadaj de l' hejmo. Rilate la tutan edukan sistemon, la instituto tre similas je l' publikaj lernejoj de Anglujo. Kaŭzo de tio estas la cirkonstanco, ke la fondinto, D-ro Lietz, pasigis du jarojn kiel instruisto en Abbotsholme, konata lernejo en Anglujo, kie li ĉerpis siajn idealajn inspirojn kaj disvolvis siajn teoriojn edukadajn. Jam en jaro 1898^a li fondis sian unuan « *Heim* » en Ilseburg » (Harz). En 1901 li malfermis sian duan lernejon (la ĉi tiean) en Haŭbinda. Fine, en 1904, lasinte kiel estron en Haŭbinda sian amikon, D-ron Marseille, kiun entuziasmigis la samaj pedagogiaj ideoj reformaj kaj altruistaj, li fondis sian trian « Hejmon edukan » en Bieberstein, apud Fulda, kie li mem nun restas kiel direktoro. La lernantoj transiras el unu lernejo en la alian: la naŭ- ĝis dekdujaraj estas en la unua, la dektri- ĝis dekkvarjaraj en la dua, kaj la dekseks- ĝis dekokjaraj en la tria. Sed ĉe ĉiuj tiuj lernejoj la programo estas la sama: instruado matene, ludoj kaj manlaboroj posttagmeze, lernekercoj personaj aŭ studado antaŭvespermanĝe, ĉiuvespere legado, muziko k. t. p. La ĉefa eduka celo de ĉiuj *Landerziehungsheime* estas, unuvorte, la harmonia elformado de l'instruatoj; t. e. ilia spirito, korpo kaj animo devas esti egalgrade edukataj, disvolvataj, perfektigataj. Tial la edukado ne fariĝas en urbo, sed en saniga kamparbieno en senpera najbareco kun bela montarpejzaĝo. La lernejo estas kvazaŭ malgranda ŝtato, kie, laŭeble, ĉio kreskas kaj produktiĝas, kion la ŝtatanetoj bezonas; ĉe tiaj kondiĉoj ili povas ekkompreni la

fariĝadon de ĉio, kio esence apartenas al la vivo kaj lerni kutimi je l' simplaj naturaj kondiĉoj de malgranda kunviv- antaro....


J. W. ECCLETON
(Germanujo).



EN SVISUJO : LERNEJA VINTRA AMUZAĴO.
Konstruado de Neĝa Kapelo.

La raportanto

TH. ROUSSEAU.



Monata Kroniko.

Jeanne d'Arc (Johanino d'Arko) estas la heroino de l' maja monato, ĉiujare, kiel ŝi estis la heroino dum sia marŝado de Blois la 28^{an} de Aprilo 1429, je sia eniro en Orleans'on la 7^{an} de Majo de la sama jaro.

Post jarcentoj, kvazaŭ kun superŝticha respekto, ne sole la Orleans'anoj, sed la tuta lando solenigas la memoron al « la bona Lotringanino ». Johanino d'Arko estas la protektintino de Francujo kiel Sankta Geneviev' estas la protektintino de Paris (Parizo). Ĝis nun, de longe, nenia nubo intermetiĝis inter tiu respektata memoro kaj la morala oferado, kiun, kun feliĉo, oni faris al ŝi. La Politiko, la malutila Politiko faris ĉiujare tion, kion preskaŭ ses jarcentoj ne provis, malgraŭ la multaj regformoj, kiuj sinsekvis unu la alian, kaj la doloraj horoj, kiujn Patrujo aŭdis sonantajn.

Ni deziru, ke estonte la spirito estu pli kvietaj, la senpartieco pli justa, kaj ke homa tolero reordigu la aferojn.

Por ni, Francoj, kiuj ajn estas niaj konvinkoj, kia ajn estos la maniero, laŭ kiu oni festos la paŝtineton, kiun internaj voĉoj gvidis, Johanino ĉiam restados la sanktulino, la heroino paginta sian vivon el sindono, el superhoma kuraĝo, el mistika antaŭenemego, per la plej terura el la turmentegoj. Sia fajrŝtiparo estis la piedstalo, kiun la ondoj de l' jarcentoj turmentitaj de tiom da elrenversoj ne sukcesis ŝanceli. Kaj eĉ se ĉio, sur tiu tero suferiga, malaperus, tamen la flamflago portita tiel fiere de Johanino antaŭ ŝiaj soldatoj restadus por ĉiuj radiiga palladium (protektilo).

Hispanujo ĝojas. Infano naskiĝis al reĝo Alfonso XIII^a kaj la gracia reĝino Viktoria. La mondo tuta ĝojas ankaŭ pro la sekvoj de la tiel ĉarma idilio komencita en Francujo, kaj kiu ŝajnis, dum ĉi tiuj prozaj tempoj, kvazaŭ efektiviĝo de feinarakonto. Pripensu ja: amediĝo inter geprincoj tiam, kiam princaj unuigoj estas nur, plej ofte, edziĝoj pro politikaj intereso! Tiu juna reĝo, tiel vere juna malgraŭ sia spiritmatureco, gajnis tuj la simpatiojn de l' mondo kaj precipe, kio povas ŝajni stranga, konsiderite la respublika regformo, la simpatio de Francujo, kaj precipe de Paris'. La plej malreĝemaj el niaj regantoj ŝajnis feliĉaj lin akcepti kaj akklami. La allogo de lia ĵumeco, la afableco de liaj manieroj, la delikateco, kiun li ĉiam montris kaj tiu bela hispana maltimo, pruvita dum tragediaj cirkonstancoj, altiris al li ĉiujn korojn. La reĝido-heredonto, estos nomata Princo de Asturias.

La Nacia Societo de l' Bel-Artoj (1) havas bontrafantajn iniciatojn. Luĝuanto de l' kastelo de Bagatelle, kiu apartenas al la Urbo Paris', ĝi organizis, la pasintan jaron, en tiu kastelo, feina pro la belegeco de l' kadro ĝin ĉirkaŭanta, retrospektivan ekspozicion de diversfakaj pentraĵoj. Tiun ĉi jaron, pli bone inspiritan ankoraŭ, ekspozicion de virinaj portretoj de la 1870^a j. ĝis la 1900^a, ĝi liveris al la publika videmo.

Tie ĉi la Virino, tiu estaĵo mistera, ŝanĝema kaj varia, aperas en kvazaŭa apoteozo. La Virino! Ha! kiu povos iam diri tion, kio kaŝas sin malantaŭ tiuj fruntoj muritaj, kio eliĝas el tiuj rigardoj, kiom da pensoj aŭ da malsinceraĵoj enŝlosas la faldo de l' mutaj lipoj, kio batis en tiuj koroj por ĉiam senmovaj, kio paligis aŭ vibrigis tiujn fizionomiojn ĉarmajn... kaj timindajn. Infanaj ridetoj, virinaj misteroj, praavinaj doloroj! Ĉiuj revivas, antaŭ niaj okuloj ravataj aŭ malkvietaj, ĉiuj tiuj de l' Imperio, ĉiuj tiuj de la tria Respubliko, la belaj, la nur beletaj, la enigmaj, la pasiaj. Kaj kiam ni diras la pasiaj, ni celas la virinojn, kiuj brilis per kelktempa helo, kaj tiujn kiuj suferis de necikatrebla vundo.

Ricard (Rikar) revivas en la allogo portreto de Sino Ernest Feydeau (Fedeo). Monticelli (Montičeli) estas inda je Rembrandt kun la portreto de sia patrino. Chaplin (Ŝaplin) kaj Cabanel (Kabanel), en malsamaj rilatoj, triumfas: unu vapora kaj tiel 18-jarcenta; la alia preciza, volemaj kaj belega.

Plena nomado estus necesa pri tiuj interesaj verkoj, ofte sfinksaj vizaĝoj, kies eternan enigmon la homo penadas diveni, kaj kiujn subskribis A. Stevens (portreto de Fino Montrosier), Baudry, H. Regnault, Roll, Gervex, Whistler, kaj Winterhalter kies portretoj de Imperiestrino Eŭĝenio estas kurioze rigardataj. Multaj bustoj, desegnoj, gravuroj, plenigas la ekspozicion, unu el la plej sagace elpensintaj, kiuj estas liveritaj al la publiko de longe.

Malnova proverbo proklamas ke « la satiĝo mortigas la

plezuron » La milmilionuloj amerikanaĵoj ŝajnas ĝin pravigi. La tado de la mono ilin kaptas, kaj ili ne scias, kiel liberigi sin je riĉeco, iĝintaj ŝarĝoj. De tiu sento devenas la princaj donacoj, kiujn ili faras al utilaj kreaĵoj, al institucioj moralaj kaj spiritaĵoj, por la kreado de muzeoj, bibliotekoj, universitatoj. Centmilione, ili dotas sian landon per utilaj fondoĵoj. Peabody kaj lia edzino komencis jam de longe; Carnegie, Pierpont Morgan ilin sekvis. Kaj Ameriko, dank' al tiuj malavaraĵoj donaculoj, pliriĉiĝas je establoj, kiuj multe superas la maloftajn provojn iniciatitajn en Eŭropo.

Tiuj milmilionuloj, ofte eniataj, ŝajnas la plej plendindaj homoj. La administrado de ilia riĉeco lasas al ili neniam ripozmomenton. Kaj neniam ili povas revigi eligi el la komercaferoj, kiuj ruinigas ilian sanon. Rockefeller, mem, diris: nur lakton mi povas trinki!

Kaj la ĵurnalo « Daily Chronicle » sciigas antaŭ ne longe ke Sro Schwab, eksdirektoro de l' staltrasto, iĝis preskaŭ laca pro sia senlima riĉegeco, kaj pro la priokupoj de ĝi naskataj. Li estas vendonta sian palacon en Riverside, en kiu li enlutis dudek milionojn. Oni aldonas, ke li ĵus proponis al la fianĉino de sia frato dek milionojn kiel doton, sed tiu ĉi rifuzis. Ŝia estonta edzo havas modestan inĝenieran oficon kaj, saĝe, la fraŭlino estimas ke, dum la vivo, « feliĉo superas riĉecon ».

La princoj eksigiĝas: oni sciigas, ke princo Johan-Georg' de Saxe, frato de l' reĝo, ĵus forlasis siajn oficialajn oficojn por eniri en la neoficialan landanaron kaj dediĉi sin al sciencaj kaj artaj studoj. Li estis general-majoro kaj komandis la 45^{an} Infanterian brigadon.

De Milano oni skribas ke la *Madono* d'Albert Dürer, unu el la ĉefverkoj de l' majstro, ŝteleliĝis el Fabriano, kie ŝi estis konservata en fermebla ŝranko. Ĉar oni malfermis tre malofte tiun ŝrankon, oni supozas ke ĝi estas forprenita de longe, kaj transportita fremdlanden, kie ĝi kaŭzas la ĝojon de kolektistoj malmulte konsciendubema pri la deveno de sia trezoro.

Alia malapero sensacia. La korpo de Sankta Vincento de Paŭlo estas kunportita de Francujo, plej sekrete, en la novicejon de l' fratinoj de l' ordeno, ĉe Ans, apud Lieĝo. La sanktrestuĵo havas necetimeblan valoron. Ĝi kuŝas nun malantaŭ la ĉefaltaro de la kapelo de l' noviculinoj, kaj estos malfermita — kaj la korpo proponata al la honorego de l' fideluloj — dum la ĉefaj solenoj.

Joris-Karl Huysmans mortis antaŭ ne longe, post teruraj suferadoj. Tiu plumverkisto, flandradevena, sed naskita en Francujo, estis komence fervora naturalisto kaj finigis sian vivon kiel admirinda suferanto de la krista fido. Li apartenis al la grupo de Zola kaj estis unu el la kvin de l' « Vesperoj de Medan » (2). *Le dragoir aux épices, A Vau l'Eau, les Sœurs Vatar, A Rebours, La Bas*, ekfamigis lin. Poste evolucio okazis en li; kaj la seniluziigo, la skeptikulo sen kaŭzo — ĉu li ankaŭ aŭdis voĉojn? — serĉis fervore rifuĝejon ĉe l' eklezio. Li apartigis sin de sia estintaĵo, forlasis Paris (Parizon), kaj sin rifugiis dum du monatoj ĉe la Oblat'ojn de Liguje. Post tiu konvertiĝo li skribis *l'Oblat; Sainte Lydwine de Schiedam; la Cathédrale; en Route; les Foulés de Lourdes*. Kvankam profunde konvinkita, Huysmans ne estis blinda; kaj admirante la kristan moralon, li ne povis kaŝi la profundan tedon kaŭzatan en sia konscienco kaj animo, de la maniero laŭ kiu ili postvivigas siajn doktrinojn.


La lasta gesto de Huysmans havis superhoman belecon; li mortis montrante la stoicecon de filozofoj kaj la serenecon de katekumeno (konvertito).

Alia plumverkisto tre konata, André Theuriet, pereis kiel Huysmans pro la sekvoj mortigaj de kankro. Poeto rava, romanisto delikata kaj rafinita, dramverkisto, li sciis vibrigi ĉiujn lirajn kordojn. Neniu pli bone ol li kantis pli delikate la naturon. De li, la herbejoj, la arboretoj, la akvoj, la spektakloj ondigaĵaj kaj diversaj de la Tero, fruktoporta nutrantino de l' homaro, estis glorigataj en parfumaj strofoj, en prozo emocia, kvazaŭ ŝtona. Ne aprobante firme Esperanton, li permesis almenaŭ la tradukon de kelkaj el siaj noveloj en nian lingvon, kaj tio indigas lin je dankamemoro de l' esperantistoj.

EUG. KAJ AŬG. MONTROSIER.

(1) Ekzistas en Francujo du gravaj artaj Societoj: la Societo de l' francaj artistoj, kaj la Nacia Societo de l' Bel-Artoj. Ĉiu havas sian propran ekspozicion (salonon). Apud verkoj pri pura arto, la dua elmontras verkojn pri aplikitaj artoj: mebloj, juveloj, ornamaĵoj, k. t. p. (2) *Les Soirées de Médan*, fama volumo el noveloj de kvin aŭtoroj: E. Zola, J.-K. Huysmans, H. Cécile, L. Hennique kaj Paul Alexis.

Io bona povas veni de Angluo.



Kiam vi deziras skribi bonan artikoleon, vi nur bezonas olei la maŝinon, tio estas vi malfermas la Krestomation je la ajn paĝo kaj vi legas duonon da horo. Vi sidigas en seĝegon, vi metas la piedojn sur la kamenon, per krajono blua vi substrekas forte, plej forte kiel eble, la erarojn, kiuj troviĝas en la libro, ĉar certe vi ne forgesas trovi kelkajn...

Tiam vi fermas la libron, vi direktas la okulojn al la ĉielo kaj pripensas. Ne forgesu apogi la kapon sur la dekstra mano. Subite la ideoj ekfluas. Kelkafoje estas dramo, komedio, tragedio; aliffoje: rakonteto, poezio, praktikaj ideoj. Sidante ĉiam en la sama seĝo, en la sama loko, rigardante la saman punkton: pentraĵon, gravuraĵon k. t. p. vi certe ne bezonas serĉi ideojn, ili elfluas...

Vi sidigas je via skribotablo, ĉiam la sama. Sur la tablo kuŝas esperantaj literaturaĵoj, precipe ĵurnaloj: «Tra la Mondo», «Espero Pacifista», «Germana Esperantisto», «Hispana Suno», «The British Esperantist» k. t. p. en belordo. Se vi estas Franco, ne forgesu kelkajn fotografaĵojn: via edzino, karulino, kato, tio, kion vi plej multe ŝatas. Anglo vi estas: metu kelkajn funtojn sterlingajn; Germano: pretigu vian porcelanan pipon; Ruso: ne forgesu kelkajn bombojn; Hispano: la fotografaĵon de ĉiuj toreadoroj estintaj kaj estontaj...

Vi do prenas nemakulitan folion de papero, vian pli bonan plumon, kiun vi trempas en la Stephens inkon, se vi estas vera Esperantisto; vi metas pezan ŝtonon, kiun vi trovis sur la marbordo aŭ aliloke, sur vian paperon; tiam vi povas apogi la kapon sur via maldekstra mano aŭ ludi kun viaj buklitaj haroj... se vi havas harojn! kaj vi skribas...

Ni supozu ke vi forgesis viajn ideojn: ekbruligu cigaredon, frapu sur la tablon sufiĉe malforte por ne ĝin rompi, marŝu en la ĉambro kelkajn minutojn, sidigu kaj daŭrigu... Kiel vi vidas, la afero estas tre facila.



PORTEBLAJ
PROPAGANDILOJ.

Ni ne forgesu la poŝhorloĝon «L'Espero»!

Kiam vi diras al viaj gelernantoj: «Estas absolute necese skribi por akiri bonan stilon, ili rigardas vin per okuloj larĝaj kiel granejporoj: la ideo neniam antaŭe eniris ilian kapon.

Kiam vi multe legis, multe skribis, kiam vi akiris bonan stilon, vi ne devas halti ĉar vi ne jam estas Esperantisto. Vi devas senĉese paroli Esperanton. Ĉu vi jam rimarkis kiel la infanoj ripetas vortojn, frazojn dum la tuta tago...; fariĝu do infanoj dum unu monato (la konsilo ne estas por miaj samideanoj, ili tion ne bezonas).

Kiam vi legas, skribas, parolas rapide, bone, elokvente, vi ne jam estas Esperantisto ĉar vi ne faris vian plenan devon. Vi devas propagandi la sanktan ideon, la plej belan el la tuta idearo.

La homoj estas scivolemaj. Ni utiligu tion ĉi kvaliton! Unue, ni ĉiuj uzu la bonegan kaj belan poŝhorloĝon «L'Espero»; ni ĉiam kaj ĉie portu la verdan stelon ĉe nia butonruo. Ĉu ni devas honti porti la verdan stelon? Ĉu ni devas timi la mokojn, la ridojn? Ni estas Esperantistoj. — Mi ne konas floron kiu estas pli bela en la butonruo ol nia verda stelo. Mi memoras junulinon en Boulogne-sur-Mer kiu portis ĝin en la haroj super la frunto; tiu ĉi stelo verda altiris la atenton, aldonis al la fraŭlino ian pikantecon kiu elvokis dolĉajn sentojn...

Se ni estus	Sur niaj brustoj
Esperantistoj	La verdan stelon
Ĉiam ni portus	Gloran simbolon, Sed...

Due ĉe la esperantistaj festoj, baloj, koncertoj k. t. p. ni portu silkan blankverdan banderolon sur blanka veŝto. Ni ornamu nin por la festoj; sufiĉe longe ni estis korvoj!

FIŝRAKONTO.

En malgranda trinkejo, ian vesperon, malmultaj sinjoroj rakontis siajn grandajn faraĵojn: ĉiu estis pli mirinda ol la antaŭa. Fine, oni demandis al Amerikano, kiu sidante aŭskultis, kian grandan faron li iam faris.

— Nu, li diris, mi estis fiŝkaptisto dum la tuta vivo, kaj kompreneble mi kaptis multajn grandegajn fiŝojn; la plej grandan el ĉiuj mi eltriris el Lago Superioro la lastan jaron.

— Kion ĝi pezis. Sinjoro? demandis alia.

— Mi ne povas tion diri, ĉar ĝi estis tro granda, por ke oni povu ĝin pesi per ia pesilo.

— Ha! kredeble ĝi estis ja tre granda, ili respondis.

Poste, grizhara maljunulo, ankoraŭ ridetanta pro la rakonteto diris: «Mi faris eĉ pli gravan aferon ol tiu. Mi estas bolegil-

Alia ideo sed ne lasta, ni inventu ordenon — Zamenhofan ordenon — kravatton similan al la Légion d'honneur, kiun ni portus ĉirkaŭ la kolo. Ĉiuj Esperantistoj portus verdan kravatton kun ordinara stelo. La kavaliroj portus blankan verdan kravatton kun ordinara stelo ĉirkaŭita per ora ringo k. t. p. Multaj laborus, kiuj faras nenion, se ili estus ornamantaj de Zamenhof mem.

Ni inventu malkaran lignan aŭ feran ŝildon, kaj ni ĉiuj surmetu ĝin sur niajn murojn. Kiam ni promenos en urbo angla aŭ franca aŭ germana ni estos certaj vidi «stelojn».

La ŝildo estu verda por la Esperantistoj,
verda blanka por la Pacifistoj,
verda ruĝa por la Ruĝuloj,
verda nigra por la Nigruloj, k. t. p.

Alie sed ne laste, nur por la frenezuloj — kaj feliĉe ili estas multaj en Esperantolando — kiel Theophile Gautier ni portu blankan veŝton aŭ ruĝan veŝton sur kiun oni fiksus verdajn stelojn, smeraldajn juvelojn stelajn.

Unuvorte ni propagandu senĉese Esperanton. La stelo, la poŝhorloĝo, la ŝildo, la banderolo devus esti bonaj ideoj.

H. G. MARÉCHAL,
el Leeds (Anglujo).

Unu el niaj abonintoj-amikoj, Sr^o J. B., kiu jam aĉetis poŝhorloĝon «Espero» skribas, mendante alian: «Ĝi estas donacota, kiel premio, al pafa societo, kies ano mi estas... Mi estas certa ke ĝi estos akceptata plezurege.»

Ĉiuj, kiuj konas tiun bonegan poŝhorloĝon konsentos pri tiu juĝo.

faristo, kaj la lastan jaron, mi faris tre grandegan bolegilon.

— Kian amplekson ĝi havis? demandis la Amerikano.

— Ĝi estis tiel grandega, ke oni ne povis ĝin mezuri, sed por doni al vi ideon pri ĝia grandeco, ian tagon, kiam mi estis tuj tagmanĝonta, je la unua horo, mi nevole lasis fali martelon tra la «hom-truo» ĉe la supro de la bolegilo, kaj kiam mi revenis je la dua horo, mi ĝin aŭdis ĵus frapantan la fundon.

— Jes, diris la Amerikano, tiu sendube estis grandega laboraĵo, sed por kio oni bezonis tiel grandegan bolegilon?

— Por boligi vian fiŝegon, Sinjoro, kompreneble estis la respondo.

WALTER H. MEIGH.

APRIL-MAJO 1907.

La 3^a ekspozicio svisa de aŭtomobiloj, cikloj kaj motorboatoj.

Zurich, 15-26^{an} de majo 1907.

Merkredon la 15^{an} de tiu ĉi monato malfermiĝis tiu ekspozicio, sed kelkajn tagojn antaŭe oni estis farinta konkurson de aŭtomobilaj ŝarĝveturiloj kiu daŭris kvin tagojn kaj donis bonegajn rezultatojn.

El 18 veturiloj, 16 estis svisaj kaj 2 fremdaj: 1 germana kaj 1 franca. Tiu ĉi estis la unua de sia kategorio.

Nun oni povas vidi la venkintojn de tiu ĉi malfacilega konkurso (deklivoj ĝis 15 0/0, traveturo tra kampoj, grandaj ŝarĝaĵoj, k.t.p.) ankoraŭ tute kovritajn de polvo, inter la aliaj novaj ŝarĝveturiloj de la Ekspozicio.

Tuj enirante oni vidas motorboatojn turismajn kaj kuradajn, inter aliaj la « Mais je vais piquer » kiu partoprenis en la kuradoj de Monako, Ĝuste antaŭ la enirpordo, grandega « Bibendum » invitas la sportistojn viziti la Ekspozicion.

En la sekvanta salonego estas preskaŭ nur bicikloj, motorbikikloj kaj pneŭmoj.

Tre interesa estis la motoro de la « Motosacoche », kiun oni tratranĉis por ke oni povu vidi, kiel ĝi funkcias, kaj kiun, cetere, oni povis jam vidi en la lasta Pariza Aŭtomobila Ekspozicio. Rimarkinde estas ke multaj fabrikoj uzas tiun motoron por siaj « Motoretoj ».

Alia malpeza motoro estas la « Moto-Revo », ducilindra motoro kun magneta-sistemo, tiel malgranda ke oni povus ĝin kredi ludilo.

Alia svisa firmo prezentas motorekleton kun du ĉenoj anstataŭ rimeno.

Apud tiu salono estas eksterkonstruaĵo, kie funkciadas maŝinoj por fari dentradajn kaj aliajn ilojn. Oni vidas tie ankaŭ la ŝarĝveturilojn, kaj produktaĵojn de fabrikejoj de benzino kaj oleo.

Sur la unua etaĝo, troviĝas la luksaj aŭtomobiloj. Rimarkindaj estas unu sencilindra motoro kaj alia elektra motoro sen diferencalo.

Krom la multaj svisaj aŭtomobiloj, estas ankaŭ kelkaj fremdaj, precipe francaj.

Inter la aŭto-framoj estas unu Peugeot'a tre bone prezentita: kelkaj partoj kiel la ŝangilo por rapidumoj estas kovritaj de travideblaj vitroj kaj sub tiuj ĉi troviĝas eĉ elektraĵoj por ĝi pli facila la alrigardon.

Ĉirkaŭ la halo estas ĉiuj aŭtomobilaj akcesorioj: lanternoj, magnet-sistemoj, akumulatoroj, kornoj, mezuriloj por rapideco, voltmetroj, k. t. p.

En la ĝardeno kuŝas granda luksa motorboato kun komforta kajuto tre eleganta.

Necesus paroli multe pli detale pri tiu ĉi bela ekspozicio, por doni ĝustan ideon pri ĝi, sed mi ne havas sufiĉe da spaco por tion fari. Tamen mi esperas ke la jena artikoleto sufiĉos por montri la nunan staton de la svisa aŭtomobila industrio, kaj la grandegajn progresojn kiujn ĝi faris de malmulte da tempo.

J. MATTES, el Zurich.

La triumfoj de nova ciklisto.

Van Houwaert, jen la nomo de tiu ĉi « comingman » (t. e. la viro kiu alvenas). Simpla servisto en farmdomo, li scias apenaŭ legi kaj skribi, komprenas nur dudekon da francaj vortoj; sed li

aliformiĝas tuj kiam li rajdas bicikleton kaj puŝas ĝin al la celo.


Sen helpo, sen flegoj, sen maŝinoj por ŝanĝi, sen aŭtomobiloj sekvantaj lin, ne parolante france, tiu ĉi nekonatulo venkis multe da reĝoj de la vojo kaj alvenas dua en *Paris-Roubaix* malantaŭ *Garrigou*, la ĉampiono de Francujo. Vidante tion, kion li faris sen helpo, firmo helpas al li, donas al li maŝinojn, flegistojn, aŭtomobilojn por sekvo kaj tiu ĉi mirinda viro, venkante ĉiujn glorulojn, ĉiujn famajn kuristojn alvenas unua en la « Popola Kurado » *Bordeaux-Paris*. Mi vidas lin ankoraŭ, kiam, post la pluvo kiu trairis lin la tagon antaŭan, sub varmega suno li, en polvo, supreniris la deklivon de Saint-Rémy-les-Chevreuse, (1800 m. 5 0/0) post 570 km. for Bordeaux.

Ekvidante la unuan meze la amaso de l' ciklistoj kaj aŭtomobiloj, ni kriis « Kiu? Kiu? » — « Estas la Belgo ». Tiam ni vidis tiun viron premantan sur siaj pedaloj per forta, ritma premo kaj ni tuj ekpensis. « Vere, li estas bela batalanto ». Kaj de ili mem la aplaŭdoj eksonis, ĉar por nia koro de sportisto, la spektaklo de la energio, de la volo kiu venkas ĉiujn barojn estas la plej bela spektaklo el ĉiuj.

Tri mortintoj.

Sed ho! ve, post la kantoj al la gloro de la nova famulo, estas por ni malgaja devo plori niajn mortintojn. La funebra falĉistino

ŝajnas pli kruela tiun ĉi jaron ol kutime. Tri kuristoj, unu jam fama, filo de grava konstruisto, *Albert Clément*, la du aliaj malpli konataj, *Marius Pin* kaj *Lewis Gresse*, pereis, oferitaj de l' fatalo, dum provaj iradoj de siaj veturiloj por la proksimaj kuradoj. Se kelkaj pensas ke la kuradoj estas senutilaj kaj malspritaĵoj, ni ne estas el tiuj homoj, kontraŭe. Sola la kurado permesas perfektigojn kaj provojn de novaj elpensadoj. Kaj, ni salut- as tre profunde tiujn tri homojn, kiuj mortis martiroj de idealo, kaj de revo al gloro; kaj, se mem la kuradoj ne utilis por industrio, ni devus malgraŭ tio danki al ili, ĉar ili estas lernejoj de Volo, Energio kaj Idealo, Idealo al la ĉiama pligrandiĝo de la homa potenco!



Laŭ « La Suisse Sportive ».

LA EKSPOZICIO DE LA NEUCHATELA AŬTOMOBILA SOCIETO EN BOUDRY.



La Targa Florio — 21^{an} de Aprilo.


En la unua grava kurado de l' jaro la sukceso alvenas al Italujo.

Por la kurado mem, oni povas diri ke tiun ĉi jaron ĝi sukcesis por la unua fojo, ĉar la lastan jaron por ĝi kunvenis nur ĉirkaŭe dek du konkurantoj, kaj tiun ĉi jaron estis 46 partoprenantaj veturiloj, kiuj ne timis la ĉirkaŭon de Sicilio, 150 km. kiujn oni devis suriri tri fojojn. La plej granda malfacilaĵo estis la teraĵo kaj la lando mem. La vojo estas monta, kruta, kurbiga kaj mallarĝa kaj oni diris ke la Italaj gajnis tiun kuradon pro la voj- kurbigo mem. La kuristoj italaj sin preparadis tute speciale por ĝi kaj ili konis la vojon tute; kontraŭe, la fremduloj ĉeestis nur de kelkaj tagoj. Jen la teknikaj rezultatoj:

- 1^a NAZZARO (Italo) 8h 17' 36".
- 2^a LANCIA (Italo) 8h 29' 29".
- 3^a FABRY (Italo) 8h 32' 47".
- 4^a DURAY (Franco) 8h 39' 7".

L. DE GUESNET.





ARTISTA AŬ LITERATURA VIVADO



LA NASKO DOMO DE SHAKESPEARE.



LA HEJMO DE ANN. HATHAWAY.

Notoj pri la vivado de Shakespeare.

Esperantistoj el ĉiuj nacioj, kvankam eble ili bone konas la nomon kaj verkojn de nia glora angla poeto Shakespeare (elparolu Ŝekspir), eble ŝatus pli bone koni lian vivon kaj la interesan lokon kie li naskiĝis; kaj al tiu ĉi celo la jena mallonga rakonto estas skribita.

William Shakespeare naskiĝis la 23^{an} de Aprilo 1564, en malgranda domo ĉe Stratford-on-Avon kaj li estis la plej maljuna el dek gefratoj. La domo, kiu nunatempe estas sama interne kiel antaŭe, estas iom ŝanĝita ekstere. Sed malgraŭ tio ĉi, miloj da vizitantoj tien iras por ĝin ekzameni, kaj dum la Paskaj festoj kaj la tempo (Aprilo) kiam okazas la ĉiujara festo, oni vidas senfinan influon kaj elfluon da viroj, kaj aŭdas multajn diversajn fremdajn lingvojn. Ni esperu ke post ne longe ni ankaŭ aŭdos la belsonan Esperanton.

Kvankam la patro de Shakespeare ne estis riĉulo li donigis bonan edukadon ĉe la loka lernejo al sia filo ĝis li atingis dekvar jarojn, kiam la familio mone embarasiĝis; tiam la knabo devis resti hejme kaj labori kun sia patro por la subteno de la familio. Sed dum tiu ĉi periodo Shakespeare sendube akiris grandan elsciadon pri la homa naturo. Stratford-on-Avon estis tre prospera urbo, kie okazis multaj foiroj, kaj kie ĉieaj komercistoj de ĉiuj specaj komercaĵoj renkontiĝis. La angla reĝa kortego ankaŭ estis tiutempe afero de supermezura belegeco kaj la junulo ĉeestis ĉe vere reĝa parado, kiu okazis

por honorigi viziton de Reĝino Elizabeth al la apuda kastelo de Kenilworth.

Kiam li havis 18 jarojn li edziĝis je Ann Hathaway, fraŭlino kiu loĝis ĉe la vilago Shottery, kaj kiu havis preskaŭ 8 jarojn pli ol li. Post tri jaroj naskiĝis de ili dunaskitoj, Hamnet kaj Judeth.

Shakespeare ankoraŭ daŭris loĝi en Stratford ĝis li malfeliĉe konatiĝis kun kelkaj sentaŭguloj, kiuj decidis lin ilin helpi ŝteli cervojn el la parko de S^{ro} Lucy.

Pro tio ĉi oni lin monpunegis, kaj por sin venĝi pri tio, kion li kredis esti severa puno, li verkis tre venĝeman baladon pri S^{ro} Lucy, kiu tiel pligrandigis lian persekutadon, ke li devis forlasi Stratfordon

kaj trovi rifuĝejon en Londono, kie, ne konante iun, li suferis multajn senigojn en la komenco. Por perlabori sian ĉiutagan panon li atendis ĉiuvespere ekster la porde de la teatro, por zorgi pri la ĉevaloj de tiuj kiuj ne havis servistojn, kaj iom post iom li tiel bone konatiĝis, ke li baldaŭ komencis surrampi la ŝtupetaron de la famo. Poste, li partoprenis en la aktoj kaj dum la 1589^{aj} iĝis partoprenanto de la Blackfriars teatro kaj verkis kelkajn teatraĵojn.

Li revenis Stratford-on post kvin jaroj kaj daŭris verki ĝis sia morto 1616. Li ja estis tiel laborema, ke dum sia vivo li verkis 37 teatraĵojn.

En la Preĝejo de la Iriuno troviĝas multaj interesplenaj memoraĵoj, inter aliaj la bele skulptita mura monumento de Shakespeare en la horejo, kaj la skulptita baptopelvo je kiu li estis baptata.




SANKTEJA RINGO.


Sur la ekstero de la norda pordo ankaŭ estas kurioza antikva Sankteja Ringo, kiu multe interesas antikvajistojn. Antaŭe ĝi, kiu faris krimon povis savi al si la vivon, se li tien tuj flugis kaj tenante la ringon, konfesis sian krimon samtempe petegante pardonon.

Forpasis multe da jaroj, de kiam oni ne uzis tiujn ĉi ringojn, kaj nunatempe tre malmulte el ili ekzistas.

FLORENCE A. MEIGH,
(Anglujo).



LA BAPTOPELVO
Je kiu Shakespeare estis baptata.



La Glavo.

El « La Sentimentala vojaĝo » de LAWRENCE STERNE.

Mi ne diros detale la kaŭzojn, kiuj iom post iom ruinigis la familion d'E*** en Bretagne. (Britan-regiono). Markizo d'E*** tre kuraĝe estis batalinta kontraŭ la malfavora sorto, dezirante konservi, kaj ankaŭ montri al la mondo, restaĵojn de tio, kio estis estintaj liaj prapatroj... sed li troviĝis kondamnita vivi senlukse. Apenaŭ li havis sufiĉe por vivi... Liaj du filoj ŝajnis peti ion pli ol la simpla helpo por vivi, kaj li kredis ke ili estas indaj je plej bona sorto. Li estis provinta akirigi al ili situacion en la armeo, sed sensukcese. Estis necese elspezi super la rento. La malmulto da bieno, kiu restis al li postulis la plej severan ŝparadon. Estis do por li nur unu rimedo, kaj ĝi estis la komerco.

Sed, ĉu tio ne estis sensukigigi por ĉiam la radikon de la malgranda arbo, kiun lia malhumilegeco, kaj lia amemo, volis vidi refloranta? Feliĉe la Britan-provinco konservis la privilegion forskui la antaŭjuĝojn. Li tion uzis. Ian tagon, kiam la Administrantaro estis kunveninta en Rennes, kun siaj du filoj li aliris la kunvenejon, kaj tre inde, valorigis la favoron de malnova leĝo de la duklando, kiu, kvankam tre malofte aplikata, tamen plene ekzistis.

Li formetis sian glavon de sia flanko: « Prenu ĝin » li diris « jen estas ĝi, estu la fidelaj konservantoj ĝis pli feliĉa sorto ebligos, ke mi ĝin reprenos por ĝin uzi honorinde. »

La prezidanto akceptis la glavon. La markizo vidis enmeti ĝin en la arhivojn de lia domo kaj deiris.

La morgaŭan tagon li enŝipiĝis kun sia tuta familio al Martiniko. Fervora akurateco por la komerco, dum dek naŭ aŭ dudek jaroj, kaj kelkaj

neatenditaj heredoj de malproksimaj parencoj redonis al li sufiĉe por subteni lian nobelecon, kaj li revenis hejmen por postuli sian glavon.

Mi havis la feliĉon ĉeesti en Rennes, dum la tago de tiu solena fariĝo. Kiun alian nomon povus doni al ĝi sentimentala vojaĝanto? Malfeliĉo! por tiuj, kiujn tiaj scenoj ne kortuŝas!

La Markizo, tenante per la mano sian respektindan edzinon, modeste aperis meze de la kunvenintaro. Lia unuanaskita filo kondukis sian fratindon, kaj la duanaskita estis apud sia patrino. Vizaĝtuko kaŝis la larmojn de tiu bona patro.

La plej profunda silento regis ĉe la tuta ĉeestantaro. La markizo komisiis sian edzinon al sia pli juna filo kaj al sia filino, antaŭeniris je ses paŝoj al la prezidanto kaj petis sian glavon. Oni redonis ĝin al li. Tuj kiam li havis ĝin, li eltiris ĝin preskaŭ tute el la glavingo. Ĝi estis la brila vizaĝo de amiko, kiun jam de longe li ne estis rigardinta. Li ĝin ekzamenis atente, komencante per la tenilo, kvazaŭ por certigi al si, ke ĝi estas la lia. Ekvidinte iom da rustaĵo ĉe la pinto, li proksimigis ĝin al siaj okuloj, kaj ŝajnis al mi, ke larmo falis sur la rustitan lokon. La sekvo montris al mi ke mi ne eraris: « Mi trovos — li diris — ian alian rimedon por ĝin purigi. »

Li reeningigis la glavon, dankis tiujn, kiuj estis ĝin konservintaj, kaj deiris kune kun sia edzino, sia filino kaj siaj du filoj.

Kiom mi enviis al li, liajn sentojn!

Esp. de J. C. SNAPE.
Anglujo.



Esperanto kaj Ruĝa-Kruco.

La 15^an de majo okazis parolado de L^{to} Bayol, ĉe la « Unuiĝo de la Virinoj de Francujo ». Antaŭ multenombra kaj ĉarma aŭdantinaro, la fervora apostolo de la ideo: Esperanto — Ruĝa-Kruco, pritraktis ĝin speciale.

Sed, por montri per faktoj, ke lia ideo ne estas utopio; ke, pli kaj pli, pro la kreskanta internacieca grado de l' militoj, interkomprenilo estas necesa; ke tiu bezono estis sentita kaj konstatita de militoj estroj mem, L^{to} Bayol komencis sian paroladon legante leteron skribitan de Kap^o Capé al Profesoro Cart, je l' okazo de parolado farita de tiu ĉi ĉe la lernejo St Cyr, kaj enhavantan la absolutan konstaton, faritan de altrangaj militaj estroj dum la internacia Ĥina militiro, ke pro la manko de lingvo konata de ĉiuj diversnaciaj kunmilitantoj la militagoj estis, ofte, malfaciligataj aŭ komprometataj.

Niaj legantoj konas du el tiuj atestoj, nome tiuj de Generalo Bailloud kaj de L^{to} Kolonelo Ballandier. Ĉiuj estroj bedaŭris same ke internacia lingvo ne estis parolata dum la aludata internacia militiro (1).

Se la bezono de internacia lingvo, konata de ĉiuj, ekzistas por la militantoj, plue ankoraŭ pli granda ĝi estas por la vunditoj kaj por tiuj, kiuj donis al si, memvole, la noblan taskon ilin zorgi kaj konsoli.

Tiun duan punkton ekzamenas poste, kaj klarigas konvinke, la paroladanto. Kaj, alparolante la distingindan prezidantaron de la Societo, Sin^o Pérouse, li dankas sin emocie, pro la helpo, kiun ŝia klarvidanta apago alportas al la disvastiĝo de Esperanto en la rondojn Ruĝ-krucistajn.

Leŭt^o Bayol montras fine, kiel la celon trafotan oni povos atingi. Kaj je tiu ĉi momento, li analizas ĵus aperintan broŝureton, analogian al la famkonataj « Slosiloj » de nia amiko Ĉefeĉ, kaj al kiu ni kore deziras saman efikecon. Ĝi estas « Guide Esperanto de la Croix-Rouge », eltiraĵo el la broŝuro « Esp. kaj Ruĝa-Kruco ».

(5c, 2 Sd., ĉe P. E. S.)

Tiu gvidilo, por Francoj (diversnaciaj eldonoj sekvos) enhavas mallongan sed sufiĉan aron de frazoj utilotaj en ambulanco, hospitalo; por kuracistoj, vunditoj, k. t. p.

Unua kolono enhavas la tekston francan, dua la Esperantan, tria la elparolon de Esperanto per la nacia lingvo. Ekz.:

2^a kolono
Kio okazis al vi
Mi estas vundita

3^a kolono
Kj-o o-ka-ziss al vi?
Mi éss-tass voun-di-ta.

Dank' al tiu libreto, soldato franca eĉ tute nekonanta Esperanton, povos interparoli kun iaajnacia flegistino aŭ kuracisto. Kombinante ĝin kun la Ĉefeĉaĵoj oni povos, kompreneble, post tre malmulte da tempo, akiri pli plenan kaj pli ĝeneralan konon pri Esperanto. Ambaŭ libretoj devus troviĝi en la vestpoŝo de ĉiu militisto. Leŭt^o Bayol finis sian paroladon, tre aplaŭditan, per la espero, ke baldaŭ oni vidos ĉie la verdan stelon akompani la ruĝan krucon, same kiel la verda estas la komplementa koloro de l' ruĝo.

Sur la estrado sidis, apud S^{ino} Pérouse, kelkaj gekomitatanoj de la societo, inter kiuj generalo Priou; S^{ino} kaj Generalo Sébert.

Tre afable Sin^o Pérouse eldiris la deziron interparoli kun Kap^o Capé, kiu ĉeestis la paroladon, promotoro de l' franca milita movado esperantista, tiel feliĉe specialigita de Leŭt^o Bayol. Ŝi esprimis al li sian profundan konvinkon pri la utileco de l' klopodoj de tiu lasta, bedaŭrante ke, pro manko de interkonsento, pri tiu punkto, inter la tri francaj ruĝ-krucaj societoj, (2) propono favora al Esperanto ne povos esti farata de la francaj societoj dum la Londona internacia ruĝ-kruca kongreso.

(1) Vidu la 1^{an} non de « Tra la Mondo » (2^a jaro).

(2) La 2 aliaj estas « Societo de l' francaj Sinjorinoj » kaj « Franca Societo por helpoj al vunditoj. »

Tamen ĉiu espero ne estas ankoraŭ perdita ĉar, eble, la demando estos prezentata de fremdaj societoj. Ni ĝin kore deziras. (3)

Kurso estas nun farita ĉe la « Unuiĝo de la Virinoj de Francujo » de Leŭt^o Bayol, sekvota de paroladaj kunsidoj direktotaj de kapitano Moch.

A. M.

Apogante sin sur la movado esperantista ruĝ-kruca, nia fervora Samideano L. Borson, konsulo en Château-Thierry kaj Prezidanto de l' ĝenerala sindikato de l' francaj farmaciistoj, faras ageman propagandon en la farmaciaj rondo per la bulteno de l' sindikato. Dank' al liaj klopodoj kaj al tiuj de alia fervora farmaciisto, S^{ro} Rousseau, kurso — farita de tiu lasta — malfermiĝis la 27^{an} de Majo, kun parolado de L^{to} Bayol.

(3) Dum la korektado de l' presprovaĵoj ni eksciis ke Generalo Sébert, kiu — la 23^{an} de Majo — prezidis la ĝeneralan kunvenon de l' Unuiĝo de la Virinoj de Francujo, parolante tre favore por Esperanto, presigis alvokon al ĉiuj deligitoj al la 8^a Internacia Konferenco Ruĝ-Kruca, en Londonon.


Oni povas do esperi ke la deziroj efektivigos.

Esperanto en la mara Armeo.

Ĉe la Aviso « Ibis » de la franca militŝiparo.

Niaj legantoj scias ke la franca armeo iĝas pli kaj pli favora al Esperanto, kiun militistoj ĉiurangaj lernadas nune en pli ol unu kazerno.

Plezure ni hodiaŭ sciigas, ke simila movado ĵus komencis en la franca milita maristaro, kies indiferentecon kontraŭ



SUR LA AVISO « IBIS ».

Kapitano Comte kaj liaj lernantoj.

Esperanto ni longe bedaŭris. Dank' al la klopodoj de S^o Duchochois, vic-prezidanto de la Grupo de Boulogne s/Mer, konsulo Esperantista, kaj dank' al la afableco de la ŝipestro de Aviso « Ibis » (S^o Guilhon, kapitano de fregato), kurso Esperanta estas farata, de la 30^a de Januaro, ĉe tiu ĉi Aviso de la militŝiparo. Kompreneble la kurso estas deviga por neniu, kaj okazas dum la horoj liberaj de la ŝipanaro. Malgraŭ diversaj malhelpoj (kelkaj forveturadoj de la ŝipoj aŭ de la profesoro) la kurso daŭradis ĝis nune, kaj kunigas ankoraŭ

Vidu la sekvon sur la Aldono (paĝo IV).



La Hundo de Brisquet. ⁽¹⁾

En nia arbaro Lyons, apud la vilaĝeto « La Goupillière », tre proksime granda putfontano, kiu apartenas al la kapelo Sankta Mathurin, estis bonulo, arbohakisto, kiu estis nomata Brisquet, aŭ alie la fendisto je la bona hakilo, kaj kiu vivis malriĉe, dank' al la produktaĵoj de siaj branĉaroj, kun sia edzino, kiu estis nomata Brisquette. (2) La bona Dio estis doninta al ili du beletajn infanojn: bruna knabo sepjara kiu havis nomon Biscotin, (3) kaj blondulino sesjara, kiu havis nomon Biscotine (4). Krom tio, ili havis hundinon, kun hararo frizita, nigra sur la tuta korpo, escepte sur la nazo, kiu estis fajrokolora; kaj ŝi estis ja la plej bona hundino en la lando pro sia alligiteco al siaj mastroj. Oni ŝin nomis La Bichonne (5).

Vi memoras la tempon, kiam venis tiom da lupoj en la arbaron Lyons. Tio estis en la jaro de la neĝegoj, kiam la malriĉaj homoj multe penadis por vivi. Tio estis terura ĉagrenego en la urbo.

Brisquet, kiu iris ĉiam al sia laboro, kaj kiu ne timis la lupojn, dank' al sia bona hakilo, diris ian matenon al Brisquette:

— Edzino, vin mi petas, lasi kuri nek Biscotin nek Biscotine, ĝis Sinjoro la granda Lupĉasisto estos veninta. Danĝero estas por ili. Ili havas sufiĉe da spaco por marŝi inter la altaĵeto kaj la lageto, de kiam mi plantis fostetojn sur la bordo de la lageto por ilin antaŭgardi pri malfeliĉo. Vin mi petas ankaŭ ne lasi eliri la Bichonne, kiu nur deziras troti.

Brisquet diris ĉiumatene same al Brisquette. Tiun vesperon li ne alvenis je l' horo kutima. Brisquette iris sur la sojlon de la pordo, reeniris, reeliris kaj diris, krucigante siajn brakojn:

« Dio mia, kiel li malfruiĝas! »

Kaj poste, ŝi eliris ankoraŭ kriante:

« He! Brisquet! »

Kaj la Bichonne saltis sur ŝin ĝis la ŝultroj, kiel por diri al ŝi: « Ĉu mi ne iros? »

« Pacon » al ŝi diris Brisquette.

« Aŭdu, Biscotine, iru ĝis proksime la altaĵeto, por vidi ĉu cia patro ne revenas.

Kaj ci, Biscotin, iru sur la vojon laŭ la lageto observante ĉu ne mankas fostetoj kaj krii laŭte: « Brisquet! Brisquet! »

« Pacon do! Bichonne ».

La geinfanoj iris, iradis kaj kiam ili rekuniĝis en la lokon, kie la vojeto de la lageto renkontas tiun de la altaĵeto:

« Mordien, (6) diris Biscotin, mi retrovos nian malfeliĉan patron aŭ la lupoj min tie manĝos ».

« Pardjen, (7) diris Biscotine, ili min ankaŭ tie manĝos ja ».

Dum tiu tempo Brisquet estis laŭirinta la grandan vojon, pasinte en la Croix aux Anes (azenkruco), apud la abatejo de Mortemer, tial ke li havis dorskorbon da branĉetaroj por liveri al Jean Pasquier.

« Ĉu ci ne vidis niajn geinfanojn » diris al li Brisquette.

« Niajn geinfanojn? diris Brisquet, niajn geinfanojn? Dio mia! ĉu ili eliris! »

« Mi ilin sendis renkonte al ci, ĝis la altaĵeto kaj la lageto, sed ci venis laŭ alia vojo ».

Brisquet ne deponis sian bonan hakilon. Li ekkuris al la altaĵeto. « Se ci kunprenus la Bichonne? » al li kriis Brisquette.

La Bichonne estis jam tre malproksime. Ŝi estis tiel malproksime, ke baldaŭ Brisquet ŝin ne plu vidis kaj li vane kriis:

« Biscotin, Biscotine! »

Oni ne respondis al li. Tiam li ekploris, ĉar li imagis ke liaj infanoj estas perdiĝintaj.

Kurinte longatempe, longatempe, li kredis rekoni la voĉon de la Bichonne. Li marŝis rekte al la densejo, al la loko kie ĝi aŭdiĝis, kaj tien li eniris kun sia bona hakilo levita.

La Bichonne estis alveninta tien en la momento kiam Biscotin kaj Biscotine estis tuj manĝegotaj de dika lupo. Ŝi estis ĵetinta sin antaŭ ĝin bojante, por ke ŝiaj bojoj avertu Brisquet. Brisquet, per bato de sia bona hakilo, mortige frapas la lupon, sed estis tro malfrue por la Bichonne, ŝi jam ne plu vivis.

Brisquet, Biscotin kaj Biscotine realiris al Brisquette. Estis granda ĝojo, sed ĉiuj ploris. Ne estis unu rigardo, kiu ne serĉis la Bichonne.

Brisquet enterigis la Bichonne ĉe la ekstremajo de sia ĝardeneto, sub dika ŝtono, sur kiu la lernejestro skribis latine:

Ĉi tie estas la Biŝon'
Malfeliĉ' hundo de Brisquet.

Kaj de tiu tempo, komuna proverbo diras:
« Malfeliĉa kiel la hundo de Brisquet, kiu iris nur unufoje en la arbaron, kaj kiun manĝis la lupoj ».

El CHARLES NODIER,
Speciale tradukita « por Tra la Mondo »
De JOSEPH PION.

(1) Elparolu Briske. — (2) Brisket. — (3) Biskotin (in=naza sono). — (4) Biskotin. — (5) La Biŝon. — (6) Mordienne, blasfemeto franca. — (7) Pardienne, alia franca blasfemeto.

Spa.

La fama belga Banurbo.

Spa, urbeto de 7000 loĝantoj kuŝas en alta Belgujo. Montetoj ĝin ŝirmas kontraŭ la norda blovo. Sude, malforta deklivo kondukas rapide ĝis la plej imponaj stepoj de la Belga Ardeno. Spa estas fama de l' tempo kiam la caro de Rusujo, Petro I^a, ĝin vizitis, kaj tie resaniĝis.

La ĉefa ŝando de Spa estas ĝia resaniga akvo. Oni ĝin nomas « Puhono ». Ĝi enhavas precipe feran karbonaton, kaj karbonan acidon; ĝi speciale rehavigas la energion per la renoviĝo de l' sango. La urbo kaj la proksima ĉirkaŭaĵo havas kelkajn fontojn de Puhono. Oni trinkas ĝin; ĝia gusto ne estas malagrabla. Oni ankaŭ ĝin uzas por banoj, kiujn oni tre komforte ricevas ĉe la Banmonumento, unu el la plej rimarkindaj el Eŭropo (vidaĵo). La nuna direktoro de l' bandomo, S^{ro} inĝeniero Decq, estas fervora esperantisto.

Multegaj kompodomoj, grandaj kaj malgrandaj, ricevas dum la bela sezono gajajn, elegantajn loĝantojn. Tiam la urbo havas senĉesan ŝajnon de festo; efektive, artaj kaj sportaj festoj okazas ĉiujare, sufiĉege. Belega kursalo estas nun konstruata.

Ĉarmaj arbaroj ĉirkaŭas la tutan urbon. Oni kalkulas tra ili 200 diversajn promenejojn, ĝenerale tre bone konservitajn. Neniu somera restadejo en Belgujo posedas ion kompareblan.

Urbo Spa organizas je la 20^a de Julio venonta, ekspozicion de balneologio. Tie oni vidos esperantistan faketon. La samideanoj el Verviers (Vervje) kaj el Spa kunigos, kun la helpo de l' Belga Ligo Esperantista, diversajn dokumentojn montrantajn ke la neŭtrala lingvo estas jam bone disvastigita. Geografiaj kartoj, multenombraj ĵurnaloj, libroj, reklamoj, k. t. p. pruvos ke Esperanto daŭrigas sian progresadon, kaj povos konvinki ĉiujn eksterulojn, kiuj vizitados somere la malnovan banurbon.

La esperantistaj ekskursantoj ne pentos, se ili vizitos Spa-on ĉi tiun jaron. Estos aparte agrable konstati, ke internacia urbo ŝatas internacian lingvon. Esperantistujo estas devige la dua patrujo de ĉiu Esperantisto.



SPA : LA BANMONUMENTO.

La sekretario de l' Ekspozicio estas Place Verte 20, Verviers. Ĉiu Esperantisto estas petata sendi laŭ tiu adreso, ĉion kio povus esti ekspoziciata. Ili helpos disvastigi l' internacian lingvon en internacia urbo.

A. G.

VIZITETO AL KEMBRIGA BOATKONKURSO. JUNIO 6, 1907.

Ĉie vidiĝis tondraj nuboj, kaj oftégaj pluvegoj preskaŭ dronigis la blankestitulinojn; tamen tia estis ilia fervoro ke, malgraŭ ĉio, miloj post miloj da gevizitantoj kune elmigris el la urbo kaj laŭ diversaj manieroj sin trovis fine sur la kotaj bordoj de la Cam rivero.

Kompreneble la feliĉuloj tien veturis boate, aŭ reminte, aŭ trite de ĉevalo, aŭ en granda ekskursiva boato vapora.

Je tridek m. post la kvina komencas la kurado, kaj intertempe oni sin amuzas ĉu per teomango, aŭ per promenadeto inter la vasta kolektigintularo.

Ĝuste je la difinita momento oni aŭdas la pafojn, kiuj signalas la ekforiron. Unu post alia, la dekkvin aŭ dek ses eksterordinare mallarĝaj boatoj forlasas la celon, kaj la diverse koloritaj vestaĵoj de la okopoj montras la Kolegion, kiu ili reprezentas.

La celo de ĉiu remantaro estas, frapi per la akra pinto de la boato la plejproksiman boaton antaŭ si. Se oni sukcesis tion fari, grandega estas la triumfado de la venkintoj, kiuj ornamas siajn pajlajn ĉapelojn per floroj. Post tia frapo, la frapinto kaj la frapito ekŝiĝas el la konkurado, sed la sekvantan tagon ili denove remas sed tiu, kiu estas frapita la antaŭan tagon nun sekvas, anstataŭ antaŭveni la frapinton.

Pro tio, ke la konkurenco okazas kvar tagojn, estas eble al tre forta remantaro frapi kvar boatojn dum la jaro. La granda honoro estas, kompreneble, esti la unua boato, kies anoj « Estras la Riveron ».

Estas tregege ekscitige, vidi la preter-rematajn boatojn, kiam ĉiuj la junaj apudestantoj sur la riverbordo kriegas kaj ekkuras laŭlonge la bordon, por esti apud ilia speciale elektita boato kiam ĝi eble frapos la antaŭanton.

Estas en la homamaso eĉ multe da personoj kiuj pafas per revolveroj kaj kelkaj rajdas sur ĉevaloj por kuraĝigi kaj direkti la diversajn remantarojn de ili flegataj.

Vespere okazas ĉiam tre grandaj Kolegiaj festenoj, kaj poste la studentoj estas tre ekscititaj. En Oxford antaŭ du semajnoj, post tiuj festenoj, centoj da studentoj faris noktan ekskurson kaj bruligis multe da tre valora lignaĵo speciale konstruita por la granda venonta eksterdoma teatraĵo tie peparita. Ili kontraŭbatalis la policanojn, kaj fine multe da ili estis ĵetitaj en la riveron, antaŭ ol trankviligi.

Niaj estontaj Kongresanoj do povas esti kontentaj, ke niaj festoj ne ankoraŭ necesigis la starigon de eksterdomaj konstruaĵoj ĉar, se estus estinte alie, tre certe ili estus bruligitaj de niaj amikoj la studentoj, por provizi al ili iom da amuzetado, kaj ankaŭ por elmontri sian simpatian al la Oxfordaj kunfratoj.

HOBOMO.



SPA : FONTO DE « PUHONO ».



Jus junulo diris al mi: « Tre grandan servon al mi vi faros se vi havos la afablecon klarigi enigmon, kiun mi ne povas solvi kvankam de kelke da tempo mi senĉese turmentas mian cerbon. Kia estas do tiu malfacilaĵo? mi respondis; sed ĉar mi estas tre kapdolorema tre certe mi ne estos bona helpantino. — Ne timu; vi tute ne bezonos serĉi por tion trovi. Jen: Ĉiuj virinoj havas mienon tiel ĝojan, ke ni ĉiuj, viroj, tremante demandas al ni reciproke: « Kial do la gracia sekso montras tian gajan vizaĝon? Ĉu la feminismo ricevis grandegan antaŭenpuŝon? Ĉu la masturbado tre baldaŭ estos nia ĉiutaga laboro? » Ekridigante mi lin interrompis kaj ekkriis: « Rekuragiĝu, rekuragiĝu, ni ŝajnas kaj efektive estas, kaj vi ankaŭ rajtas esti — pro la plezuro de viaj okuloj — feliĉaj, ĉar la Modo volas, ke la nunan sezonon ni estu rave belaj: kiel novaĵon ĝi alportis ja al ni punton, ankoraŭ punton, ĉiam punton; kaj nenio estas pli vera ol la jena diro de nia ĉiekonata belega aktorino, Léonie Yahne: « La punto estas admirinda poemo de malpeza fleksebleco, ĉar ĝi estas samtempe la stilo kaj la ĉarmo de l' tualetto, kaj ĉar ĝi plibeligas tiujn, kiuj por si scias per ĝi fari vaporan kadron de revo. »

Jes, karaj samideaninoj, ĉie oni vidas puntojn; nune ili estas vera kontagio (1). La silka ĉemizeto estas mortinta kaj tute mortinta: la laboristinetto same kiel la riĉulino havas sian puntan korsaĵon, kiu kompreneble estas malkara, sed tamen laŭmoda.

La puntaj boleroj kun mallongaj manikoj estas neimageble ŝatataj. Kvankam ne tre novaj, ili estas tiel luksaj, ke ĉiu elegantulino volas havi tian akcesoraĵon. Tute ĉarmaj ankaŭ la paltetoj el brodaĵo.

Neeviteble tiu ŝatego al la puntoj mortigis la skarpajn el lintolaĵo kaj silka muslino; triumfas nur la longa punta skarp.

Novajo vere originala, sed, bedaŭrinde, tre kara, estas la robo laŭ la Imperia Modo farita per ŝalo el Ĥina krepo brodita. Enviindaj estas nun la virinoj havantaj filon aŭ fraton en Ĥinujo, Tonkino, Alĝerio, ĉar tre malkare ili povas aĉeti tiujn grandvaloraĵajn ŝalojn.

Unu el la lastaj kreaĵoj de la Modo estas la mantelo-stolo, el tafto kun tulaj kaj pasamentaj ornamaĵoj.

Mallonga aŭ longa la jaketo de l' kostumo-tajloro estas grandampleksa ĉe la talio. Blua jaketo borderita per nigra atlaso estas tre ŝatata kun jupo el kvadrilita ŝtofo blua kaj blanka aŭ blua kaj verda. La boleroj havas demetebajn manikojn, kiujn tenas dikaj butonoj. Laŭ la vetero, oni metas aŭ demetas tiujn manikojn, aŭ pli ĝustadire tiujn falbalajn kuŝantajn sur la maniko el punto aŭ brodaĵo, kiu preskaŭ tute vidigas. Kiam tiuj manikoj kaj la supraĵo de l' korsaĵo estas el japana ŝtofo oni vualas ilin per nigra silka muslino.

Preskaŭ ĉiuj zonumoj havas malantaŭe banton nomatan banto-papilio.

La tolaj kostumoj havas tiel multe da sukceso dum la varma sezono, ke estas granda diverseco da toltekstaĵoj. Unuj estas kvadrilitaj aŭ striitaj. (Inter tiuj ĉi lastaj, la larĝaj strioj nigraj kaj blankaj aŭ bluaj kaj blankaj estas tre elektindaj). Aliaj pli elegantaj havas grandajn kvadratojn enhavantajn broditajn rondojn; aliaj estas blankaj kun larĝaj strioj kolorigitaj. Tre

beletaj la pastelaj broditaj kaj la rondoj tratruitaj, ekzemple, nigraj kaj verdaj aŭ nigraj kaj bluaj sur blanka tolaĵo.

Inter la vaporaj ŝtofoj estas alloga novaĵo: blanka lintolaĵo kun desegnoj formantaj kronetojn el verda foliaro kun beroj kaj floretoj el broditaj bantoj.

Por la marbordaĵo la modo de l' modoj estas la jaketo el saktolaĵo kovrita per brodaĵo el ŝnureto.

Ĉu inter miaj legantinoj estaj kelkaj patrinoj, kiuj alprenis la neelegantan kutimon venintan el Ameriko: piedvesti la etetulojn per sandaloj sen ŝtrumpoj nek ŝtrumpetoj? Mi ne kredas, ke tiu ĉi modo alklimatiĝos en Francujo: miaj samlandulinoj tro ŝatas la estetikon por opinii belvida tiun kampan piedveston, kiu vere ne harmonie konformiĝas kun luksaj kaj ĉapelo.



El «La Mode Parisienne», 37, av. de l'Opéra, Paris.»

MODELO DE BACHWITZ.

Ankoraŭ unu vorteton por diri, ke la ŝtrumpetenilo el angla brodaĵo kun rubandoj anstataŭas nun la klasikan kaŭĉukan ŝtrumpetenilon. Niaj korsetoj ankaŭ estas el sama brodaĵo.

Nia modelo tre moda estas el striita ŝtofo. Korsaĵo kun japanaj manikoj ornamita per broditaj ornamaĵoj. Kravato kaj returnaĵo de l' manikoj el tafto. Butonoj broditaj sur tolaĵo. Punta ĉemizeto. Jupo-korseleto el naŭ partoj, kies zonumo ŝajnas pasi sub la larĝaj faldoj antaŭaj kaj malantaŭaj.

Karaj samideanoj, Roksano ne vin forgesas; jen estas kelkaj linioj por vi. Per *azaleo* preskaŭ rozkolora ornamu la butontruan de via jako, ĉar grafo Boni de Castellane, la reĝo de l' eleganteco, freŝe portis tiun delikatan floron, tiun veluran sonorileton. Kaj precipe ne kaŝu ĝian voston; male, la Modo postulas, ke ĝi tre videble sin montru.

ROKSANO.

Hon. Mem. de la « Esperantista Vagabonda Klubo ».

Mallonga korespondado.

Malfeliĉa dikulino. — Jen estas simpla kuracilo por malgrasiĝi ne uzante drogojn. Manĝu malvarmajn viandojn, pleje blankajn; legomojn sen butero; senigu vin je ĉiu kukaĵo; dum viaj manĝoj trinku tre varman teon ne sukeritan; kaj ĉiumatene trinku en varma teo aŭ kamomilo la sukron de du aŭ tri citronoj.

Luisita en Barcelono. — El mia tuta koro mi vin kompatas, sed la jena miksaĵo, je kiu vi ŝmiros viajn brakojn dum 3 aŭ 4 sinsekvaj tagoj, ebligas ke vi surmetu korsaĵojn kuu mallongaj manikoj; ĉar ĝi tre efikas sur la malbelegajn

haretojn de l' brakoj.

Jodo.	0 gramo 75
Ricina oleo.	2 »
Alkoholo	10 »
Kolodiono.	30 »
Oleo el terebinto	20 gutoj.

R.

Roksano, 1 rue Andoque, Béziers, France, respondas private la leterojn enhavantajn 50 centimojn kaj per la revuo tiujn enhavantajn 25 centimojn.

(1) Latine: *contagio*, france, *angle*, hispane: *contagion*.

La Specialistoj.

Tradukita el la Holanda lingvo. (1)

— Vi juĝos tion stranga, doktoro... mi parolis mian edzinon pri ĝi, sed ŝi ridas pri tio, nature por trankviligi min ... mi estas «self-made man» (2)... ne estas sekreto. . mi estis butiketisto sed nun mi posedas milionojn. Vi scias, mi regas la « Worlds Combined Cheese Trust de Nov-Jorko, Ŝikago, Denvero, Parizo, Berlino kaj Londono.... Kiam mi estis ankoraŭ juna, tempe de mia tre malagrabra malriĉeco, mi estis neprudenta.... ho, kiam oni ne jam signifas ion, kaj ne havas unu cendon en la poŝo, tiam la vivo ne havas multe da valoro.... Iatage mi aĉetis oranĝon sur la strato, ordinaran, po unu cendo; kaj du kernojn mi englutis, kiuj estas nun tie ĉi, en mia ventro, kiuj estas tie, tiel firmaj kiel muro. Mi sentas ilin; ili devas esti forigataj; indiferente pri kia kosto, sed tio estas necesa.

— Kaj kiam tio okazis?

— Antaŭ dekunu jaroj!

— Tiam vi ne bezonas timi. Estus tre strange kaj treege malofte, se la malsanĝermo elmontriĝus ĵus nun.

— Tamen, spiregis S^{ro} Soft, tamen, doktoro, ĝi estas vera.. mi volas, ke vi serioze konsideru. Mi volas esti ekzamenata. Mi sentas, ke la afero eble estas mortiga.

— Imago, S^{ro} Soft.

— Neniel, vi devas ekzameni min! Mi estas veninta ĉe vin, ĉar vi estas la plej fama. Mi povus iri Berlinon aŭ Parizon. Sed mi ne volas! La plej bona, la plej kapabla kuracisto en la mondo min helpu!

La kuracisto, flatata, ridetis apenaŭ videble, metis sian okulvitron, kaj respondis afable:

— Senvestigu vin, S^{ro} Soft! Mi ne povas lasi niajn famajn industriistojn en necerteco. Mi ne povus pardoni min, se, pro malatenteco, la malsano pli-graviĝus; ĉar via morto estus malfeliĉego por la lando.

Sed frotinte, pinĉinte kaj frapinte la ventron de la suferanto, li diris decidiĝe:

— Vi manĝas tro multe! Vi devas manĝi pli malmulte, triuki pli malmulte; pli malmulte da ostroj, pli malmulte da ĉampano, pli malmulte profiti la bonon, tiam la doloro foriros samtempe.

La « trust »reĝo ne estis konvinkita.

— Mi certigas vin, doktoro, ke mi sentas ĝin en la apendico.

— Absolute ne, sinjoro.

— Tamen, doktoro, mi sentas ĝin.

— Vi eble povas senti ĝin, mi diras al vi, ne! La vorto de D^{ro} Bull sufiĉas.

— Tamen mi sentas ĝin, persistis S^{ro} Soft.

La kuracisto premis elektran premilon kaj diris al la servanto: kiu sekvas?

— Doktoro, mi diras al vi, ke vi ne vidis ĝin....

— Mi sentas ĝin.. Mi tamen ne estas infano.

— Du cent dolarojn vi ŝuldas al mi por la ekzameno. Kiam D^{ro} Bull diras ion, li estas certa. Vi komprenas, kara sinjoro, ke multaj suferantoj atendas ankoraŭ. Ĉu vi volas la sumon enskribotan aŭ ĉu vi deziras pagi nun?

— Kontante, ĉiam kontante!

Tiam Soft metis siajn du cent dolarojn en kristalan vazon, li ree klopodis interesi la kuraciston al sia malsano, sed ĵus sinjorino kune kun infano eniris, kaj la fama kuracisto sin okupis tuj malfirmigi tukon. Li eliris, post nekora saluto, sed lia indigneco estis granda.

En sia veturilo, li reprenis sian duone legitan gazeton kaj unue li vidis ree: « Kidder kaj Cutter, specialistoj, sanigo por ia ajn malsano: renmalsano, ftizo, apendic-absceso, 3227 Okcidente 66^a strato. Telefonnumero 1111. Li malamas ĉarlatanojn, sed estis io en tiu ĉi nomo « Kidder kaj Cutter », kiu donis konfidon al li.

Tia famviro kiel D^{ro} Bull konsideras nature ĉiujn homojn samspecaj, kamentubpuristojn kaj aristokratojn, ĉiujn samspecaj. Sed ĝuste tia kuracisto, kiu ne trovis jam sian vojon, tiu ĉi utiligos sian tutan konadon por helpi la famon: « Ni sanigis Louis Soft ». Tia anonco valorus milojn por komencantoj. La saman efikon ĝi havas kiel vorto: « Korteg-liveranto » en eksterlando. Kaj kial ili estus ĉarlatanoj? Tiuj ĉi du kuracistoj volas resanigi, kaj tial ili anoncadas! Evans ankaŭ anoncadis dum sia tuta vivado kaj tamen li estas unu el la plej famaj kuracistoj, kvankam nur por la dentoj. Reĝino Viktoria venigis lin de Filadelfio ĝis Balmoralo kaj ŝi donis al li atestojn, kaj bonajn! Mi estu reĝino Viktoria por Kidder kaj Cutter! Kian doloron vi havas! Tre profunde en la ventro! Malagrablan, svenigantan doloron. — La simplanimeco de tiu kuracisto diris, vi manĝas tro multe!!

Tra la interna paroltubo de la veturilo, al la veturigisto li ordonis: 3227 Okcidente 66^a.

Dio, kiel malsana li estas! Jes, ne estas imago! Ĝi estas kvazaŭ oni pikus lin per pingloj en lian korpon. Li devas iri al la borso....; sed la borso.. al la infero!... Sano estas la sola feliĉo en la vivado!

3227 estas malgranda brunŝtona dometo kun multaj literoj sur la vitroj. S^{ro} Soft majeste eniris la koridoron, konsciante la konsternon kiun lia apero en tiu ĉi domo alportos. Tie li flaris kariofilan supon. Malantaŭe infano ploris.

Li atendis kelkajn momentojn en ĉambro, en kiu staris multaj boteloj sur tabuletoj je la muroj. Tiam eniris malgrasa, glatrazita, pala sinjoro, kiu havis multajn nigrajn harojn.

(1) Sekvo. Vidu la majan numeron. (2) Viro, kiu progresis en la mondo per mempotenco.

— D^{ro} Kidder, li diris.

— S^{ro} Louis Soft, ĝenerala direktoro de la « Worlds Combined Cheese Trust », estis la respondanto.

La malgrasa viro riverencis kaj forprenis la ĉarpierojn de siaj malriĉaj vestoj. Li ekaŭdis interese la rakonton de la riĉegulo, komence titolis lin « Sir » poste, regate, « generalo »!

Jen, pensas Soft, inda akcepto.

D^{ro} Cutter aperis: malgranda ruĝhara vireto. La du doktoroj paroletis kune kaj petis S^{ro}n Soft iri en la salonon. Sur sofo oni lin ekzamenis.

— KREDU min, sinjoroj, ne estas imago! Ĝi estas la kerno de tiu malbeninda oranĝo. Mi estas veninta ĉe vin, ĉar mi pli konfidis al la junaj kuracistoj ol al la maljunaj. La maljunaj estas tro dorlotataj, kaj konsideras ĉiujn malsanulojn sammaniere.

D^{ro} Kidder respondis: « Ni kuracados vin kvazaŭ vi estus la reĝo de Anglujo. »

D^{ro} Cutter diris: « Ankoraŭ pli bone eĉ! »

Sed dum la ekzameno, ili rigardis malĝoje. Ili aŭskultis per nigraj aŭdiloj, frapis per malgrandaj martelitoj, pikis per pintaj arĝentaj iletoj, ŝmiris la grasnan malsanan ventron per oleo kaj pudro, kaj laboris fervorege.

S^{ro} Soft ĝemis pro timo.

Fine D^{ro} Kidder diris: kara generalo, mi bedaŭras treege diri ĝin al vi, sed vere via apendico estas supermezure trafita. Tiu ĉi estas kazo, kiu nur okazas ĉe tre delikataj organismoj; ĝi estas preskaŭ neobservebla. Kaj tamen... ne timu... ofte mortigebla. En la « Ĵurnalo de Medikamentoj » estas precize priskribite, kiamaniere reĝo Eduardo estas sanigita. Ĝi estas la sama malsano kaj vi devos toleri la saman kuracadon. Estas feliĉe, ke vi venis tien ĉi, ĉar D^{ro} Cutter dediĉis sian tutan vivadon al tio ĉi. Ni ambaŭ garantias al vi, ke vi estos tute normala post tri semajnoj.

— Mortigebla?... Ĝi estas mortigebla malsanego?... ĝemis la riĉegulo.

— Ni venkos la morton! respondis D^{ro} Cutter.

— Via vivo ne estas en danĝero ĉe ni! diris D^{ro} Kidder.

— Honorparole?

— Kiel viroj honoraj!

— Kaj kie mi devas esti operaciata?

D^{ro} Kidder pensis unumomente kaj diris: la Presbiteriana Hospitalo estas bona, la Roosevelt-Hospitalo ankaŭ kaj la Fulton-Hospitalo estas certe plej bona... vi povas elekti... sed..., kial viro kiel vi irus ĉe aliajn, kiam li povas esti prince servata hejme.

— Ĉu ĝi estas permesita hejme?

— Certe, generalo!

Ili decidis, ke la operacio okazos la venontan tagon; kaj la saman vesperon oni legis en la gazetoj de Nov-Jorko: « Monstra okazaĵo! S^{ro} Soft, ĝenerala estro de la « Worlds Combined Cheese Trust » hodiaŭ svenis en sia reĝa palaco apud « Central Park ». Doktoroj Kidder kaj Cutter, rapidege venigitaj, konstatis gravan apendic-absceson. La fama borsisto operaciĝos morgaŭ. Ni esperas, ke tiu ĉi operacio sukcesos bone, ĉar la morto de la ĉiekonata financisto kaŭzus panikon (1) ĉe le borso. »

Soft, Kidder kaj Cutter estis la nomoj, kiuj momente forgesigis Togo, Rozjestvenski, Kuroki kaj Linjevic! La grava tago venis kaj la « trust »-reĝo ricevis la specialajn raportistojn de la Nov-Jorka Ĵurnalo, al kiuj li rakontis sian vivhistorion, kiel li estas perlaborinta sian riĉecon; kaj, baldaŭ poste, eliris longa felietono: De butiketisto ĝis riĉegulo.

La gazetoj gloris lin kaj Cutter vespere eldonis plenan raporton pri siaj laboraĵoj, kaj tiun ĉi bultenon legis, sin interese, multego en « Madison Square » kaj en ĉiuj stratoj....

Ili estas senkonsciigintaj la fervoran laboranton, kaj post sep minutoj ili estas farintaj la danĝeran operacion! Singarde ili ligis la manojn de la suferanto, por ke li ne povu tuŝi la vundon.

Nuntempe Louis Soft kuŝas sur sia lito, kun la manoj ligitaj, la ventro kompresita, varma sub la dikaj kusenegoj; kaj strange ŝajnas al li, ke la operacio estis tute sendolora.

Kuracistoj Kidder kaj Cutter venis viziti lin matene, tagmeze kaj vespere, serioze paroletis en angulo de la ĉambro, palpis la kompreson kaj avertis la malsanulistinon, kiun ili mem kunkondukis, ke moviĝi ne estas permesata al la altranga suferanto.

Tiu ĉi malsanulistino, bela, blonda, juna virino, povis kvietigi la ekkolereman riĉegulon pli bone ol S^{ro} Soft. Ŝi rakontis pri pereigaj kazoj, observitaj ĉe suferantoj, kiuj ne volis obei la kuraciston. Ŝi bezonis sian tutan singardecon por malhelpi lian sensaĝan intencon, trinki ĉampanon kaj manĝi ostrojn. Li daŭre plendis pri malsato, kaj kriis ke li mortos pro manko de nutraĵo.

Sed kiam D^{ro} Kidder venis kaj diris, ke li estas progresanta, kaj ke estus malsaĝe se S^{ro} Soft, per malsingardeco, komprometus la resaniĝon, tiam li ne kontraŭbatalis plu kaj restis murmurante kiel malgranda infano, dezirante multajn bonegajn manĝaĵojn.

Kun la ruĝhara D^{ro} Cutter li parolis pri la vundo, dirante kiel strange estas, ke li ne havis doloron. D^{ro} Cutter ne parolis multe. Li ridetis kaj diris: Tio ĉi, ja, estas la mirindeco de mia metodo. Tio ĉi estas la « Reĝ-Eduarda » kuracado! La vundo estis profunda je 4 centimetroj kaj longa je 18 centimetroj, sed, per speciala tranĉo, tute sendolora.

La bultenoj en la gazetoj eliris ĉiutage kaj la publika intereso plimalgrandiĝis; tiam D^{ro} Cutter iatage venis ĉe la suferanton por proponi akcepti intervjuon de la korespondanto de ilustrata semajngazeto.

Tio ĉi plaĉis al la altranga malsanulo.

Antaŭe, la kostemaj mebloj kaj tapiŝoj estis trenataj en la dormejon; kaj iatage venis la speciala fotografisto por la sekvantaj ilustraĵoj:

S^{ro} Soft sola,

S^{ro} Soft ekzamenata de D^{ro} Cutter,

S^{ro} Soft, kaj D^{ro} Kidder palpadata lian manradikon.

S^{ro} Soft kaj lia edzino.

Daŭranta.

J. H. SALOMON.
Holandano.

(1) Teruro subita kaj sen kaŭzo, La Grekoj ĝin nomis tiel, ĉar ili kredis, ke ĝi estas inspirata de Dio Pan.

MIKSAĴOJ.

POR LA PROPAGANDO.

Iam al'flug'is anim'o antaŭ pord'eg'o'n de la ĉiel'o kaj frap'e ek'vek'is el dom'et'o sankt'a'n Petr'o'n, kiu murmur'e demand'is ĝi'n, Esper'ant'e: kio'n vi dezir'as?

Mi pet'as por en'iri ĉiel'o'n, ĝi respond'is bohem'e. Mi ne kompren'as vi'n, dir'is Petr'o kaj ferm'is la pord'eg'o'n; sed tra tru'o parol'et'is: lern'u Esper'ant'o'n!

La mal'feliĉ'a anim'o for'flug'is de'nov'e ter'e'n. Dum'e al'flug'ad'is ali'a'j anim'o'j pet'ant'a'j por en'iri ĉiel'o'n, kiuj ĉiuj parol'ad'is sia'n patr'in'a'n lingv'o'n. Oni bon'e sci'as ke ni'a Petr'o supr'e ne kon'as ali'a'n lingv'o'n krom si'a'n propr'a'n (hebre'a'n).

Li koler'is ĉar li ne pov'is kompren'i. Al ĉiuj li ferm'is la pord'eg'o'n, kaj sur'skrib'is sur si'a'n grand'an tabul'o'n jen'a'j'n vort'o'j'n: « Parol'u

Esper'ant'e! »; kiel aldono: ... sen Esper'ant'o oni neniam al'ven'os en ĉiel'o'n. Atend'ant'e, la anim'o'j'n li for'pel'is de la ĉiel'o.

Dum'e la bohem'a anim'o flug'is rekt'e « Praha » n kaj decid'is iom'et'e vizit'i Esper'ant'a'j'n kurs'o'j'n. Ĉar ĝi vol'as ĉiel'o'n, ĝi lern'is fervor'e kaj post ses tag'o'j pov'is iom parol'i Esper'ant'e.

Ĝi sci'is, ke nur bezon'as respond'i. Ĝi al'flug'is re'e pord'eg'o'n de la ĉiel'o. Ek'frap'int'e..., Sankt'a Petr'o: « Kio'n vi dezir'as? — En'iri ĉiel'o'n. — Bon'e, respond'is Petr'o; kio'n vi far'is sur ter'o? — Mi propagand'is inter'naci'a'n lingv'o'n « Esperanto ». — Bon'e, bon'e, est'us dezir'ind'e ke ĉiuj tio'n far'us. Vi pov'as en'flug'i intern'e'n ». Kaj dir'ant'e tio'n, li mal'ferm'is la pord'eg'o'n kaj favor'e ĝi'n las'is en paradiz'o'n.

Originale verkis: Jos. S.

Mi konsil'as al ĉiuj lern'i « Esperanto » n, ĉar sen ĝi nen'u al'ven'os paradiz'o'n.

Proponu tiun tekston por traduki al personoj kapablaj interesiĝi je Esperanto donante samtempe la gepatralingvan « Slosilon » de Ĉefeĉ.



REGULARO DE NIAJ KONKURSOJ.

1^e Ĉiuj problemoj proponataj kaj solvoj, amuzajoj, devas esti sendataj al sinjoro Ch. Brunet 9, cours Victor Hugo, Bordeaux, kiu prenis sur sin la redaktadon de la tuta paĝo « Miksaĵoj ». La personoj kiuj subskribas per pseŭdonimoj (supozitaj nomoj) devas ĉiam aldoni sian veran nomon.

2^e Krom esceptoj speciale direktaj la solvoj devas esti senditaj al S^{ro} Brunet antaŭ la dato montrita post la problemoj.

3^e Divenintoj estas ordigataj, kvaronjare, laŭ la nombro de ĝustaj solvoj senditaj de ĉiu, kaj premioj estas donacataj al la plej sagacaj.

4^e Por iaj konkursoj, aparte gravaj, oni aljuĝas specialajn premiojn.

Oni adresu la solvojn NUR POŝTKARTE al Sinjoro Ch. Brunet, 9, cours Victor Hugo, Bordeaux.

Neniam sendi karton surhavantan kune solvojn kaj proponatajn problemojn.

PROBLEMOJ SOLVOTAJ.

PROBLEMO 30^a (de Malvezin)

Kiuj estas la dek nomoj kvarliteraj, enhavantaj tri samajn literojn, la malsama okupante en ĉiu vorto la saman vicon.

PROBLEMO 31^a (de la sama)

Parto de korpo la unua, persona pronomo estas la dua, multe da tria en urbo loĝas, kaj en kolonioj vivas la tuto.

PROBLEMO 32^a (de la sama)

Prenu nomon de malgranda besteto, kunmetu ĝin kun parto de besta korpo, vi ricevos alian parton de besta korpo.

PROBLEMO 33^a (de la sama)

Ni estas du malamikaj bestoj, se trovinte niajn nomojn vi ilin kunmetos vi ricevos spicaĵon.

Rimarko: La solvoj de tiuj problemoj estos akceptataj ĝis la unua de Septembro 1907^a.

PRI TIU, KIU KREADIS LA BONON.

Kiam Kristo reiris en Nazareton, li trovis la urbon tiel ŝanĝitan, ke apenaŭ li povis rekon'i ĝin. Iam Nazareto estis plena per malĝojo kaj larmoj, sed nun la tuta urbo kantas la kantojn kaj pleniĝas per rido.

Kiam Bona Dio eniris tra la urba pordego, li ekvidis sklavojn, portantajn ĝirlandojn el floroj kaj suprenirantajn marmorajn ŝtupojn. Li iris post ili kaj eniris en lumplenan ĉambregon, en kiu, sur purpura kuŝejo, kuŝis unu el tiuj homoj, kiuj beligas siajn harojn per floroj kaj forigas sian soifon per dolĉaj vinoj.

Bona Dio proksimiĝis al li, ekkuŝigis sian manon sur lian ŝultron kaj demandis:

« Kial vi vivas tiel? »

La kuŝetanto ekĉirkaŭmoviĝis al Bona Dio, ekkonis Lin kaj diris:

« Mi estis malsana, kaj Vi sanigis min: kiel mi povus vivi alie? »

Bona Dio eliris el tiu ĉi domo sur straton. Post kelke da tempo Li ekvidis unu el tiuj virinoj, kies vizaĝo estas surkolorita, vestoj estas multekoloraj kaj piedoj estas beligitaj per perlaĵ ĉirkaŭaĵoj. Post la virino, junulo en kostega vesto iris malrapide. Liaj okuloj brilis pro deziro: la virino havis la vizaĝon de belega diino...

Kaj Dio ektuŝis la ŝultron de l' junulo kaj diris:

« Kial vi rigardas tiun ĉi belulinon kun granda pasio? »

La junulo ekĉirkaŭmoviĝis, ekkonis Bonan Dion kaj diris:

« Mi estis blinda, kaj Vi redonis videblecon al mi. Ĉu mi ne devas observi tian belecon ame? »

Tiam Dio proksimiĝis al la virino kaj diris:

« Vi iras sur la vojo peka; kial vi elektis ĝin? »

La virino ekkonis Dion kaj diris:

« La vojo, sur kiu mi iras, donas al mi la ĝojon, sed unu foje Vi pardonis min pro miaj pekoj? »

Granda malĝojo pleniĝis la animon Kristan; Li ekvolis eliri el tiu ĉi urbo.

Kaj, kiam ree Li trairis la urban pordegon, Li renkontis junulon sidantan apud vojo kaj plorantan maldoĉe...

Kristo proksimiĝis al li, mirante, ektuŝis liajn harojn per mano kaj demandis:

« Kial vi ploras? »

La junulo ekkonis Lin kaj diris:

« Mi estis malviva, kaj Vi ordonis al mi revivi. Ĉu mi ne devas plori?... »

De la ukraina lingvo.

Traduko de V. ŜULGIN (Rusujo).

Kelkaj artikoloj por la tria jaro.

Ni donas ĉi sube la titolojn de kelkaj el la multenombraj artikoloj, kiuj atendas preson, en niaj klasiloj. La interesatoj pardonu nin pro necito:

Morin (Meksikujo): Meksika danco. — *P. Hedstrom (Svedujo)*: La vivado de l' nordsvedaj arbarlaboristoj. — *A. P. Beauchemin (Kanado)*: Vintraj festoj kaj sportoj. — *Baff (U. Ŝ. de A.)*: Kelkaj miroj en Nov-Jorko. — *Grafo Gallois (Italujo)*: Strataj scenoj en Napolo. — *S. Balik (Bohemujo)*: Amindumo de Aŭgusto Belkapo. — *G. Kolovrat (Rusujo)*: Kelkaj vortoj pri la orienta muziko. — *Samppa Luoma (Finnlando)*: Vintra vivado sub la polusstelo. — *P. Fewings (Aŭstralio)*: Mia Patrujo. — *Arnoldo Göhl (Hungarujo)*: Transsilvanio. — *Lto Silvestriev (Bulgarujo)*: Popolaj bulgaraj kantoj. — *F. Svačina (Bohemujo)*: Diversaj priskriboj pri kutimoj kaj urboj bohemiaj. — *E. Bacquet (Francujo)*: Mezuro de l' metro; historiaj memoroj. — *Steenbuch (Japanujo)*: La Japana skribado. — *M. Finot (Francujo)*: La Suneklipsoj — Spiritismo. — *Otto Simon (Aŭstrio)*: Adolf de Sonenthal. — *M. David (Francujo)*: Diamantoj kaj diamantistoj. — *J. Pion (Francujo)*: Tri fratoj. — La Hundo de Brisquet. — *Dro R. J. Kronbauer kaj V. Riegel (Bohemujo)*: Kristnaska rakonto de blinduloj. — *V. Tabinskij (Polujo)*: Vera feliĉo. — *Fino C. W. Oxenford (Anglujo)*: La tri serĉantoj. — *A. Baissac (Alĝerujo)*: Mektub, arabaj moroj. — *R. Frenkel (Siberujo)*: Krucopalaceto. — *K. Zacherl (Bavarujo)*: Mia plej bela aventuro. — *Fino H. Hempel (Polujo)*: Ŝvarc. — La saĝa Salomo. — *J. Schraeder (Aŭstrio)*: Kial li ne povas alrigardi razilon. — *Mihajlovski kaj G. Trikjakin (Bulgarujo)*: Orientaj legendoj. — *V. Jiskra kaj Emilie Lehnertova (Bohemujo)*: La repaĉigo. — *H. Sienkiewicz kaj Sino Hulanicka (Polujo)*: Afrikaj leteroj. — *H. Nicolas (Tunisujo)*: Kartago. — *Lto A. den Hengst (Holandujo)*: El la vivado de holandindia oficiro. — *Oreškov (Bulgarujo)*: La metamorfozo. — *Dro P. Gambier* Japanaj rakontoj. — *Lindstedt (Svedujo)*: La antikva sveda mito. — *Lawrence Sterne kaj J. C. Snape (Anglujo)*: La glavó, el la « Sentimentala vojaĝo ». — *Villiard kaj Mende (Alĝerujo)*: Edziĝo en Kabilujo, k. a.

ALDONOJ estos rezervataj por niaj ABONINTOJ.

ESPERANTO INTERNACIA PRAKTIKILLO.

Turista propagando.

La 12^{an} de Majo okazis en Autun kongreseto de l' Burgundaj grupoj. Sro Bord (Beaune) prezidis, havante ĉe sia flanko reprezentantojn de l' grupoj de Dijon kaj Le Creusot. Oni decidis la kreon de Federacio de l' Burgundaj grupoj (ĉirkaŭ 20), kiu agados simile al la Iniciataj sindikatoj (oni nomas tiel societojn, kies celo estas — per taŭgaj iniciatoj — konigi sian regionon kaj altiri en ĝin kiel eble plej multe da turistoj). La Federacio celos havi en ĉiu urbo, urbeto, vilaĝo, du aŭ pli da personoj parolantaj Esperanton, kiuj gvidos bonvole la esperantistajn vizitantojn (En Beaune estas jam pli ol 20 lertaj esperantistoj).

Jen bonega ideo, praktika ideo, kiu, kiel la Esperanto-Ofico, estos riĉa je rezultatoj. Nedubeble, kiam la Iniciataj sindikatoj — el kiuj la plimulto ankoraŭ estas indiferenta pri Esperanto — estos ricevintaj de la Federacio sufiĉe da servoj, ili komprenos la signifon de nia lingvo kaj iĝos adeptoj tiom pli fervoraj, ke ili estos trovintaj profitojn per ĝi.

La sekretario de la Federacio estas Sro Hélun, tre fervora Dijon'a esperantisto, konsulo, kaj ano de multaj lokaj societoj.

La grupo en Tours propagandas favore ĉe la hotelmastroj, kaj petas la esperantistojn, ke ili skribu Esperante al ili por helpi la lokan propagandon, atentigante la hotelistojn pri nia lingvo.

Internacia Scienca Revuo.

En ĉiuj fakoj de scienco oni multe uzos Esperanton. Mi ne volas insisti pri la praktikaj profitoj, kiujn prezentos la disvastiĝo de lingvo internacia en la vidpunkto de rilatoj inter scienculoj de ĉiuj landoj, de kongresoj kaj sciencaj revuoj. En jaro 1904^a naskiĝis la unua scienca revuo tute redaktata en Esperanto, eldonita kun patronado de famaj scienculoj. Multaj artikoloj montris la taŭgecon de Esperanto, pli ol kia ajn lingvo, por ĉiuj sciencaj ideoj.

Tial, kiam kelkaj scienculoj, dum la kongreso de Genevo, decidis la kreadon de *Internacia scienca ofico*, pri kiu T. I. M. jam parolis, ili havis bonegan ideon preni *Internacia Scienca Revuo* kiel oficialan organon de Ofico; kaj nune, de januaro, reaperas I. S. R. en Genevo; ĝia ĉefredaktoro estas Sro R. de

Saussure, distinga scienculo, kies interesan artikolon niaj legantoj povis ŝati en nia gazeto.

La enhavo de l' jam eldonitaj numeroj, kaj de l' eldonotaj, montras la novan vojon de la Revuo, kiu okupos sin pri ĉiuj fakoj de sciencoj. La legado de la speciala anonco kaj de l' nomoj de kelkaj kunlaborantoj ĝin pruvas perfekte.

Tiuj nomoj estas konataj de l' Esperantistaro, kaj ni estas certaj ke, kun tia redaktistaro, I. S. R. multe helpos, per ĝia meritinda sukceso, al la disvastiĝo de Esperanto inter scienculoj.

M. F.

« Espero Katolika ».

En la n^o 33^a ni rimarkis, inter aliaj, la jenajn tre interesajn artikolojn: La eklezio anglikana; Tolstoj kaj la rusa revolucio en kiu la aŭtoro, Sro Anatole Leroy-Beaulieu, konsideras sinsekve la ideojn de l' fama rusa verkisto pri la demandoj politika, nacia, religia, sociala; katolika propaganda kroniko; pri eltrovo de Asiriaj argilaj tabuletoj surskribitaj.... Fine ni rememorigas ke nia kunfrato estas la oficiala organo de l' Ŝakludistoj, al kiu ĝi ĉiam dediĉas ludojn.

Pri « Espero Katolika » ni povas aldoni ke Sro Abato Peltier, ĝia distinga direktoro, helpis la propagandon en Le Mans, per sendo de kelkaj n^oj kaj de artikolo al « Le Nouvelliste de la Sarthe », kiu kulpigis Esperanton utili la *malbonajn aferojn*.

Jen bona uzo de faka gazeto.

Tutmonda Presarta societo.

Sro R. Marŝal, F. B. E. A, hon. sek. de la Presista esp. grupo en London, 92, Longhurst Rd. Lee, S. E., proponas la fondon de tutmonda presarta societo, celanta interrilatigi la samideanojn presistajn, sciigi ilin pri la novaj ideoj kaj procedoj, doni informojn pri unuigoj, federacioj diverslandaj, k. t. p.

Por faciligi la aranĝon de speciala kunveno dum la kongreso, Sro R. Marŝal petas ke la interesatoj, kiuj esperas ĉeesti la kongreson, bonvo'u sin turni al li kiel eble plej frue.

La interesa volumo « *Fabeloj de Fratoj Grimm* », pri kiu parolis tiel lerte nia bonega amiko P^o Christaller estas eldonita de la bonkonata firmo *Esperanto Verlag Möller & Borel* (95, Prinzenstr. Berlin S.) kaj kostas 1 fr. 90 (2 fr. 0,80 Sm. ĉe ni).

Esperanto en la Mara Armeo (Fino).

Vidu la paĝon 186.

dekduon da subofiroj kaj maristoj (1). La kurso estas farata de S^o Comte, kapitano de l' genio, bofilo de S^o advokato Michaux, la neforgesebla organizinto de nia unua kongreso (2). La lernantojn kaj la profesoron al ni montras la vidaĵo, p. 186, ŝuldata al S^o Duchochois, tiel lerta fotografanto kiel nelacigebla propagandisto. Ni ne povus lin tro gratuli pro tiu lasta varbado, ĉar ni opinias ke lia iniciativo estos fruktodona. La aviso Ibis, efektive, baldaŭ forlasos Boulogne'on, por fari sian ĉiusomeran krozadon en la Norda Maro, kie ĝi zorgadas la fiŝkaptistajn ŝiparojn, portante helpon al la difektitaj ŝipoj, kuraciston kaj kuracilojn al la malsanaj maristoj k. t. p., kaj okupante sin pri ĉiuj demandoj rilataj al la fiŝkaptado. Dum tiu krozado, ĝi ofte haltas en nefrancaj havenoj, kuŝantaj sur la bordoj de la Norda Maro, por elpreni karbojn kaj aliajn provizaĵojn. Estus bone, laŭ nia opinio, se Esperantistoj, kiuj loĝas en tiuj havenoj profitus la alvenon de « Ibis » por fari al la esperantaj maristoj akceptan esteton, kiu estus samtempe tre kuraĝiga rekompenco por fa novaj lernantoj, kaj fakto tre utila por la propagando.

(1) *Kapitano Comte, 62, rue de Tivoli, Boulogne s/Mer, Pas-de-Calais, korespondos plezure kun profesoroj de similaj kursoj faritaj ĉe militŝipoj, ĉiulandaj.*

(2) *Se ni ne eraras, ĉi tiu kurso estas la unua kurso pri Esperanto, farita ĉe militŝipo.*

Marista Esperantista Ligo.

Niaj konataj samideanoj René Mesny, profesoro de marveturado; Samuel Meyer, ŝipmakleristo kaj Rollet de l'Isle, marista ĉefingeniero, la du lastaj kunlaborantoj de « Tra la Mondo » presigis « alvokon al ĉiuj Esperantistoj » pri fondo de *Marista Esperantista Ligo*, celanta la propagandon de Esperanto ĉe la militaj kaj komercaj maristoj.

Ni altiras la atenton al tiu alvoko kaj al la projektita regularo riceveblaj senpage de S^{ro} René Mesny, La Huguette, à Granville, Manche, France.

LA DUDEKJARA JUBILEO DE ESPERANTO.

La Federacio de l' burgundaj grupoj organizas grandan feston. Ĉiu grupo, aparte, sendos telegramon al Doktoro Zamenhof, kaj la Federacio proponas ke ĉiuj grupoj de l' mondo tiel agu.

La efektiviĝo de tiu projekto liveros al nia majstro ŝtufon por « or-libro », kiel neniuj privatulo posedos.

La grupo en Orléans intencas inviti la najbarajn grupojn partopreni en feston regionan.

La grupo de Montpelijer kaj tiu de Béziers organizas feston kiu okazos en Agde. Ĉeestos samideanoj el Perpignan, Narbonne, Nimes, Lunel, Cette, k. a.

La Alĝer'a grupo intencas festi la Jubileon. Ankaŭ la grupoj en Leitmeritz (Bohemujo), Hull, Manchester (Anglujo), Neuchatel (Svisujo), diversaj grupoj en Svedujo, U. Ŝ. de A. k. c.

Ni forte konsilas al ĉiuj grupoj intencantaj solenigi la dudekjaran jubileon, ke ili presigu tuj de l' komenco de Julio, en la lokan gazetojn, artikolojn aŭ artikoletojn pri la okazintaĵo festota, ĝia graveco, kaj utiligu la cirkonstancon por resumi la progresojn de Esperanto.

Tiuj artikoloj estos bona preparo por la opinio. Plue, se iaj gazetoj estus malemaj raporti pri la festo, ili estus instigitaj ĝin fari, vidinte ke organoj de najbaraj regionoj opiniis, ke la fakto estas atentinda.

Oni ne forgesu citi, en tiuj artikoloj, la landojn festontajn la 21an de Julio; same kiel, post la jubileo, kaj kiam detaloj estos konataj, oni devos resumi ilin por montri la grandan disvastiĝon de Esperanto, kaj la kunsenton, kiu unuigas la esperantistojn.

« T. L. M. »

BIBLIOGRAFIO.

Muziko :

« Sekreta vivado », poezio de E. Van Oye; « Kion vi deziras? », poezio de J. Noterdaeme. Ambaŭ esperantigitaj de M. Seynaeve, « Sankta Nikolao », poezio de Hilda Ram, esperantigita de R. Van Melckebeke. « Antaŭen Bruĝanoj », poezio de A. J. Witteryck. La muziko, tute ĉarma, de tiuj kvar verkoj, estas de nia artisto presisto A. J. Witteryck. (1 fr. ĉe l' eldonisto de *Tra la Mondo*).

Ofte la grupoj ne povas facile kanti en siaj esperantaj festoj ĉar, laŭleĝe, la rajtoj de la aŭtoroj estas rezervitaj. Por forigi tiun malhelpon aŭ malfacilecon, S^o Witteryck permesas kanti ĝi libere siajn verkojn al la grupoj abonintaj je « *La Belga Sonorilo* » aŭ « *Tra la Mondo* ».

« L' Espero », vortoj, de L. L. Zamenhof, muziko de R. G. Tomblin. (35 c. afr. ĉe « Milton », Vaughan Road, Harrow, Anglujo).

La Rejnvirgulino, laŭ la fama kanto germana Loreley, tradukita en Esperanto de nia kunlaboranto Karl Zacherl el Passau. Eldonita de la grupo en La Chaux-de-Fonds (Svisujo): 50 ekz., 2 fr. 50; 100 ekz., 5 fr.

La poezia kanteto de Leono Zamenhof « *Mi aŭdas vin* », enpresa en la unua numero de *La Revuo*, renkontis egalvaloran muziktradukinton en S^{ro} Herbert Harris, de Boston (U. Ŝ. A.), kiu al tiuj versetoj alfaris frazon ege dolcan kaj poezian en Des.

Alia versaĵo tre lira de nia kunlaborantino, C. Oxenford, *Antaŭen iru Esperantistoj*, ankaŭ estas tradukita de Celia Burleigh, per vigla kaj originala muziko.

Gratulojn al ambaŭ muzikverkistoj.

« Tra la Mondo » aperas REGULE KAJ AKURATE la lastan tagon de ĉiu monato.

REDAKCIO kaj ADMINISTRACIO.

NUR miksaĵoj, t. e. : ludoj, amuzajoj, problemoj kaj solvoj, devas esti sendataj al S^o Brunet, 9, Cours V. Hugo, Bordeaux, (Fr.)
Manuskriptoj, kaj mendoj KUN MONO, devas esti sendataj al :

Gazeto « Tra la Mondo », Meudon (S. et O), France.

Urĵaj seiĝoj; REKLAMOJ, ANONCOJ, k. a. devas alveni antaŭ de 10^a de ĉiu monato, por la tuj elironta n^o

Oni bonvolu sendi la monon poŝtmandate — Nur de landoj ne havantaj internaciajn mandatojn, aŭ por pago de specimenoj, ni akceptas poŝtmarkojn laŭ ilia efektiva valoro.

Jara abono : 8 fr. ĉiulande. (1^a Jaro : 12 fr.) — Duona : 4.50 fr. — Kvarona : 2.25 fr. — Unu kajero : 75 c.

RIPREZENTANTOJ : Brita Imperio: British Esperanto Asocio, 13, Arundel Street, Strand, London, W. C.
Svedujo: S^{ro} P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm.

« TRA LA MONDO » estas aĉetebla pouumere ĉe la Librairie de l'Esperanto, kaj EN ĈIUJ FRANCAJ STACIDOMOJ.

POŝTAJ ABONOJ

en la jenaj landoj: *Belga, Dana, Franca, Itala, Norvega, Portugala, Sveda, Svisa.*

GLICERINA DENTPASTO



Kiu ĝin uzis, tiu ĝin uzos.

GELLE FRÈRES

Parfumistoj **PARIS**

La firmo korespondas Esperante.

Internacia Scienca Revuo

Oficiala Monata Organo de la

Internacia Scienca Oficejo Esperantista

Ĝenevo-Svislando.

Kelkaj el la lastaj originalaj artikoloj:

- Universala kalendaro*, de CARLO BOURLET, Parizo (Franc.).
- Deveno de l' speco ĉe la lepidopteroj*, de P. A. H. MUSCHAMP (Angl.).
- Projekto pri internacia atlaso de « erozio »*, de E. CHAIX, Ĝenevo (Svis.).
- Evolucio de la religia ideo*, de D^{ro} L. VALLIENNE, Parizo (Franc.).
- Pri la uzebleco de la fortoj de l' homo*, de ANDRÉ BROCA, Parizo (Franc.).
- Unu Stato de Internacia Bibliografio*, de J. HANAUER, Frankfurt a/M. (Germanujo).
- Projekto pri internacia monsisistemo*, de R. DE SAUSSURE, Ĝenevo (Svis.).
- Pri kelkaj Merovingaj kaj mezepokaj kranioj trovitaj en Angers* (Franc.) de G. V. DE LAPOUGE, Angers (Franc.).
- Nova speco kaj nova gentonomo de formikoj*, de D^{ro} A. FOREL, Yvorne (Svisujo).
- Psikologio de l' popolamasoj*, de P. LAPIDARI, (Ital.).

Specimeno senpage laŭ peto.

Jara abono: 2,75 Sm. (2 spesmitoj 75 spesdekoj), aŭ 7 frankoj.

Unu numero: 25 spesdekoj aŭ 65 centimoj.

Oni abonas ĉe la *Scienca Oficejo*, 8, rue Bovy-Lysberg, Ĝenevo (Svisujo) aŭ ĉe *Möller & Borel*, Berlino (Germanujo), *G. Warner & Co*, Parizo (Francujo), « *Brita Esperantista Asocio* » Londono (Anglujo), *Raffaello Giusti*, Livorno, (Italujo), *M. Arct*, Warszawa (Rusujo), *J. Espasa*, Barcelona (Hispanujo), *A. F. Høst & Søn*, Kjöbenhavn (Danujo).

★ ESPERANTO ★

Duonmonata internacia Gazeto.

La plej ofta! La plej malkara! La plej disvastigata!

Tutmonda Informilo — Korespondantoj en ĉiuj landoj. — Informoj politiko, komerco & industrio, financo, statistiko, leĝoscienco, instruado, teatro, k. t. p.

Felietono — Kroniko politika — Internaciaj Enketoj — Konkursoj la legantoj kun valoraj premioj.

Esperanto, en speciala parto, publikigas ĉiujn sciigojn pri la praktiko uzado de Esperanto; ĝi estas la organo de la konsuloj, Esp. Oficejoj kaj specialaj peresperantaj societoj.

Esperanto aperas en ĵurnala formato. Ĝi estas aĉetebla ĉe la belgaj, francaj, svisaj, svedaj, stacidomoj, kaj ĉe multaj publikaj ĵurnalvendistoj en ĉiuj landoj.

Unu numero: 10 centimoj (4 Sd.). Jarabono: 3 frankoj (1,20 Sm.).
Direkcio: 8 rue Bovy-Lysberg, Genève [Svisujo].

LINGVO INTERNACIA

CENTRA ORGANO DE LA ESPERANTISTAJ

eliranta la 15-an de ĉiu monato.

LA PLEJ MALNOVA EL ĈIUJ ESPERANTISTAJ
GAZETOJ FONDITA EN 1895.

ADMINISTRACIO:

Presa Esperantista Societo, 33, Rue Lacépède, Paris

JARA ABONO:

Sen Literatura Aldono 2 Sm. aŭ 5 fr.
Kun Aldono 3 Sm. aŭ 7 fr.

Specimena numero estas senpage ricevebla.

Juna Esperantisto

MONATA GAZETO

por Junuloj, Instruistoj kaj Esperanto-lernantoj

Jara abono: 2 fr. 50 (1 Sm.).

Administracio: Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris

Specimena numero estas senpage ricevebla.

LA INTERNACIA TRINKAĴO!

Viskio Esperanto

Registered trade mark Marque déposée
N^o 270,042. N^o 13,195
Registered Label No 272,434

Bonvolu observi la verdan stelon kaj la nomon **ESPERANTO** sur la afiŝeto, kiu estas desegnita kiel propagandilo.

Buchanan, Scott & Co

GARTHLAND STREET,

GLASGOW (Skotlando).

Telegrafa adreso: Esperanto - Glasgow.

MILKA
VELMA
NOISETTINE

Suchard

LA BONGUSTEGAJ

ĈOKOLADOJ

POR MANMANĜI.



ESPERANTO

Digestiga likvor

Alprenita je la Esperantista Kongreso. Genève

Prezo: FRANCUJE. 11 f50 la kesto da 2 bo

Sen kosto pri transporto impostoj.

ALLIANDE. — 4 f ĉiu bo prenit en S^t Etienne impostoj kaj transporto

Ĝenerala Tenejo por Francujo kaj Fremd

J. B. Brunon-Chauv S^t Etienne (Fra

Ni transsendas al la jenaj revuoj abonojn akompanatajn de la abonkosto. — Aldoni 10 centimojn por la transsendo de la mendo.

Ni akceptas nenian respondecon pro la nericevo de la gazetoj. Tiukaze, oni sin turnu senpere al la administracioj.

ESPERANTAJ ORGANOJ.

Afrika Esperantisto. — Senpaga. 4, Rue du Marché, Alger, Algérie.

Ĉio Esperantista. — Praktika kaj komerca. Ĉe S^{ro} Karl Steier, Plan-Ufer 41, Berlin S, Deutschland. Jare, 2 markoj (1 Sm.).

Eksport Jurnalo. — Internacia Revuo por komerco, Industrio kaj Tekniko. Jare: 5 fr. (2 Sm.). — Ĉe Esperanto Verlags-Anstalt Emil Schnell, G. m. b. H. Frankfurt a. M. Germanujo.

Esperanta Ligilo. — Monata revuo por blinduloj per Esperanta Braille'a sistemo. 3 f. — (1,20 Sm.). Ĉe S^o Cart, 12, Rue Soufflot, Paris.

Esperanto. — Speciala anonco.

Espero Katolika. — Tute Esperante. Unu No afrankita Of. 50; Francujo, 4 fr.; alilande 5 fr. Presejo Barbot, 15, r. Etienne Pallu, Tours (France). (1,60 aŭ 2 Sm.).

Espero Pacifista. — Monata organo de l'Esperantista Societo por la Paco. Jara abono 5 fr. (2 Sm.). Sin turni al S^{ro} Gaston Moch, 26 rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).

Foto-Revuo Internacia. — Speciala anonco. Juna Esperantisto. — Speciala anonco.

La Revuo. — Internacia monata literatura gazeto, kun konstanta kunlaborado de D^{ro} Zamenhof. — ĉe Hachette k. K., 79 Boulevard St-Germain, Paris. — Jare, Francujo: Fr. 6, ceteraj landoj: Fr. 7. (2,80 Sm.).

Lingvo Internacia. — Speciala anonco.

Socia internacia Revuo. — Pritraktas ĉion, kio interesas la homaran vivadon. Jare 6 fr. (2,40 Sm.). Adm. 45, rue de Saintonge, Paris-3e.

CHARLES MENDEL, ÉDITEUR
118, Rue d'Assas, PARIS.

NOVA REVUO DE FOTOGRAFADO

FOTO-REVUO

— Teksto franca kaj Esperanta. —

La Foto Revuo Internacia n'est pas la traduction en Esperanto de la Photo-Revue; c'est une revue indépendante dont les articles sont originaux ou puisés dans les meilleures revues du monde entier.

ABONO: Jare: 5 fr. (2 Sm.) por ĉiuj landoj.

PROPAGANDAJ ORGANOJ.

The American Esperanto Journal. — Jare 2 Sm., 5 fr. Boulevard station, Boston, Mass. (U.S.A.)

Amerika Esperantisto: 1 dol. (2 Sm.) L'Amerika Esperantisto, Oklahoma City. U. S. A.

Antaŭen Esperantistoj. — Hispane kaj Esperante. — Organo de la Perua esperantista societo: 3 fr. (1,20 Sm.). Administranto, Antonio Alvarado, apoteko del Teatro. Calle Lártiga, Lima (Peruo).

La Belga Sonorilo. — Bonega malnova propaganda revuo: Esperante, france, flandre. Sciigoj — Literaturo — Scienco.

Eliras duonmonate. Abono: 6 fr. (2,40 Sm.) jare. 53, Rue de Ten Bosch, Bruxelles. La abono komencas nepre la 1^{an} de Septembro.

The British Esperantist. — Jare 4 fr. — Ĉe B. E. A., 13, Arundel Street, Strand, London.

Brazila Revuo Esperantista. — Portugale kaj Esperante. 6 fr. (2,40 Sm.). — Ĉela administracio, Rua da Assembleia, 46, Rio de Janeiro, aŭ ĉe « Tra la Mondo ».

Bulgara Esperantisto. — 1 fr. 50, (0,60 Sm.). Sofio, Bulgarujo.

Ĉasopis Ĉeských Esperantistu. — Monata (krom en aŭgusto kaj septembro). Boheme kaj Esperante. Jare 3 fr. 75. (1,50 Sm.). Adm. kaj Red.: Praha II — 313 — Karlovo namesti.

L'Espérantiste. — France kaj Esperante redaktata, oficiala revuo de la S f p E: 24 paĝoj da teksto, 8 paĝoj da kovriloj kun multaj sciigoj pri la grupoj kaj ĉiuspecaj esperantistaj verkoj. Abono: Francujo 3 fr.; alilande: 3,50 fr. (1,40 Sm.). Administracio: Louviers, (Eure), France.

Esperantisten. — Svede kaj Esperante. Organo de la Svedaj Esperantistoj, fondita de la Stockolma Klubo. Ĉe P. Ahlberg, 37, Surbrunnsgatan, Stockholm. 3 fr. 75 ĉiujare (1,50 Sm.); aparta No: 35 cent. (14 Sd.)

Esperanto. — Hungare kaj Esperante. Scienca kaj literatura. 4 fr. (1,60 Sm.). Ĉe S^o Marich Agoston, Papnövelde-Utca 6, Budapest, IV.

Finna Esperantisto. — Ilarejo esperantista, Helsinski, Finnlando. 1 fr. 50 (0,60 Sm.) por la 1^a jaro.

Germana Esperantisto. — Organo de diversaj germanaj grupoj esperantistaj (ĉiunonate) Redaktata germane kaj Esperante. Jare 4 fr. (1,60 Sm.). Administracio kaj Redakcio: Esperanto Verlag, Möller & Borel Berlin, S., 95, Prinzenstrasse.

Helpa Lingvo. — Dane kaj Esperante. Abono 1,20 kr. (0,70 Sm.). Admin. ĉe F^{ino} G. Mönster, Osterbrogade 54 B, Kopenhago O., Danujo.

Japana Esperantisto. — Monata, Japane kaj Esperante, kun ilustraĵoj. Jar. 2 fr. 60 (2 Sm.). — No 1^a, 3 ĉome, Jurakō, Kozimacik, Tokio.

La Pioniro. — Jurnalo Esperanta India. Eldonata de la Kolar Gold Field Esperanto Club. Jare: 3 fr. (2 Sm.). Red. kaj Adm.: Hona Sek^o de la klubo esperantista de la K.G.F. Marikuppam, Mysore State, South India.

Pola Esperantisto. — Pole kaj Esperante. — 2 fr. 50 (1 Sm.). Akademicka 26, Lemberg, Galicio.

Ruslanda Esperantisto. — Ĉiunonata organo de la S-to « Espero »; — Jara abono 8 fr.: (3,20 Sm.) Ruslando, St Peterburgo, B. Podjačeskaja, 24, al la S^{to} « Espero. »

Suno Hispana. — Hispane kaj Esperante. Abono 3 fr. (1,20 Sm.) Administracio kaj redakcio: Avellanas, 11, presejo — Valencia (Espana).

Svisa Espero. — France kaj Esperante — 2 fr. (0,80 Sm.). Ĉe Sinjoro Renard, 6, Rue du Vieux Collège, Genève.

ESPERANTEM AJ ORGANOJ.

Les Annales politiques et littéraires. — Jare: 10 f. (4 Sm.). 15, rue St-Georges, Paris. Abono 10 fojojn repagita per la profito de l' « Carnet de la mutualité des Annales » (Libreto de l' reciproka apogo de Annales).

Le Cycliste. — Revuo monata de ciklotekniko kaj de turismo. — D^{ro}: P. de Vivie, 5, Rue de la Préfecture, Saint-Etienne. — Abono: Francujo 1 fr. 80, alilande 2 fr. 40. (1 Sm.). Ĉiuj informoj pri la bicikloj kun mekanismo por ŝanĝi la rapidumojn kaj pri higieno ciklistaj.

De Lusthof. — Ĉiunonata multilustrata revuo. — Ĝi ekzistas de 5 jaroj, kaj estas la plej bela kaj la plej malkara el la flandraj jurnaloj.

Jara abono: 2 frankoj. (0,80 Sm.).

Sin turni al la presisto de Tra la Mondo, Bruĝo, Belglando.

La plume Sténographique de France. — Universala revuo ilustrata de Stenografio kaj Daktilografio — D^{ro}: L. P. Canet, Adm., 15, Rue Manigne, Limoges. — Ĉiulandaj sciigoj pri ĉio rilatanta la rapidan skribadon kaj la skribmaŝinojn; ĉiusistema stenografio, literaturo kaj historia fako, ilustraĵoj, ludoj, k. t. p. Petu specimenon.

Il Cittadino Italiano. — Itala familia gazeto. Via della Posta, 16. Udine.

Tous les Sports. — Oficiala Gazeto de l'Unuigantaro de la Societoj Francaj de Sportoj Atletaj (100,000 anojn) D^{ro} Raoul Fabens, 29, Rue N.-D. de Nazareth, Paris. — Konstanta rubriko en Esperanto de ĉiulandaj kunlaborantoj. Jarabono: Paris 9 fr.; Dep. 10 fr.; Alil. 12 fr. — Por U. S. F. S. anoj jare: Paris 5 fr.; Dep. 6 fr.; alil. 8 fr. — Unu numero 0.15 en francaj stacidomoj. Petu specimenon. (1 fr. = 0,40 Sm.)

Esperantistaj ilustritaj Postkartoj.

Dek malsimilaj vidaĵoj de la famaj Fabrikejoj Schneider, ĉe « Le Creusot » kun Esperanta teksto. Ĉiu ekzemplero: 10 c.

Ĉe « Esperantista konsulejo », 20, Place Schneider, Le Creusot [Francujo].

Esperantaj ŝlosiloj.

Mirindaj broŝuretoj ne pezaĵ (5 gramojn), enhavantaj regulojn de Esperanto kaj « vortaron ebiligantan tuj kaj senprezare decifri kaj legi ĉion Esperante skribitan » Enmetebblaj en letaron sen pliiĝo de la poŝtkosto.

Jam estas pretaj la angla, dana, franca, germana, hispana, itala, sveda eldonoj, kaj riceveblaj po

3,50 frankoj la centon (100).

Tre rekomendindaj por la propagando. Ĉiulandaj poŝtsignoj estas akceptataj laŭ la efektiva valoro.

L'Internacia Signo

estas la « VERDA STELO » Gasse

MARKO REGISTRITA

fr. 1 por unu; fr. 9 por 12; fr. 45 por 100 (per kunmona mendo). Ĉe S^{ro} Emilo Gasse, 105, rue du Lycée, Le Havre (France).

LA PLUS LOGIQUE des Méthodes appliquée à LA PLUS SIMPLE des langues suivant LES PLUS MODERNES des principes d'enseignement des langues.

Méthode Palmer

Livre de 100 pages: fr. 1.25 (0,50 Sm.). Franco: Belgique, fr. 1.35. — Etranger, fr. 1,50

VERVIERS, Place Verte, 20.

EUGÈNE MONTROSIER, Gérant.
A. J. WITTERYCK, Presisto, Bruĝo.